

FELIX NAVARRO CLEMENTE
Tf. 325 53 81
Calixto III, 36
VALENCIA - 8

la nica literatura



revuo

Ĉefredaktoro : G. Waringhien

Redakta Komitato :

**Roger Bernard, J. Régulo Pérez, Tomàs Pump
Reto Rossetti, Ivo Rotkvič, Raymond Schwartz**

Redakcio :

7, avenue Gourdault, Choisy-le-Roi (Seine), Francujo

Administracio :

5, boulevard Stalingrad, Nice (A.-M.), Francujo

Poŝta Konto :

R. Fiquet n° 2259-98 Marseille

**Dumonata Revuo
Bimestrielle**

**Kvara Jaro. Numero 6 (24)
Julio-Aŭgusto 1959**

enhavo

Paĝoj

REDAKCIO	Kion Zamenhof ne povis diri en Ĝenevo	201
K. KALOCSAY	La klasika metriko kaj Esperanto (daŭrigo) ...	208
J. KORINEK	Soneto aŭgusta	220
Ch. TRICOU	Renkontoj, trad. R. Bernard	220
R. SCHWARTZ	Kankro-rulaĵoj	221
W. AULD	Mia filino trijara	225
St. URBAN	Mario kaj la papilioj....	226
G. MATTOS	Preĝo de la kuracisto....	231
	La skeleto	232
	3 utaoj	233
A. GREGOR	Aŭto-ekskurso, trad. J. Chvosta	234
K. PIC	Medito — Virino.....	238
LECONTE DE LISLE	La verando, trad. Tarkony	239
R. DE GOURMONT	Pripensoj	240

Represo malpermesata

Ne presitaj manuskriptoj ne estas resendataj.

La Redakcio rezervas al si la rajton konformigi la tekstojn al la Zamenhofa lingvo-uzado.

Bonvolu averti nin pri eventualaj eraroj en adreso kaj afranko

Sendante vian mendon, bonvolu indiki, ĉu ĝi estas abono aŭ reabono kaj, en kazo de nova abono, de kiam ĝi devas komenciĝi.

Artikolojn por eventuala publikigo kaj librojn por recenzo bonvolu sendi al nia Redakcio en Choisy-le-Roi; abonojn, petojn de senpagaj specimenoj, kaj mendojn de libroj direktu al nia Administracio en Nice.

Kun bedaŭro ni povas plenumi nur kontraŭpage la mendojn de niaj abonantoj pri libroj aŭ abonoj al revuoj por kiuj ni peras. La ne-abonantoj prefere ne uzu niajn servojn.

Ni povas liveri elin jam aperintajn kompletajn jarkolektojn de nia revuo. Sin turni al niaj perantoj.

Niaj servoj ne funkcias dum Aŭgusto.

PLENA GRAMATIKO

EN 3 VOLUMOJ

K. Kalocsay

G. Waringhien

Vidu la prezojn sur n° 22a kaj 23a

KION ZAMENHOF NE POVIS DIRI EN ĜENEVO

En nia lasta numero ni publikigis du leterojn de Zamenhof al Dro Javal pri la homaranismo. Sed la intenco de Zamenhof estis mem klarigi la tutan aferon antaŭ la kongreso, en Ĝenevo. Tial li verkis longan paroladon, kies nur unua parto estis eldirita kaj publikigita: la dua, laŭ la admonoj de Sébert kaj Javal, kiuj tre timis malbonan efikon sur la propagando kaj ruinigan reagon de Baufont, restis en la manuskripto. Ĝin la Nica Revuo publikigas nun unuafoje, kaj dediĉas al la Varsovia Kongreso.

L. N. L. R.

Mi diris, ke, krom la oficiala esenco de la esperantismo, kiu estas esprimita en la Bulonja Deklaracio, la esperantismo enhavas ankoraŭ **ideon internan**, kiu ne estas deviga por ĉiuj, sed kiun memvole kulturas en si ĉiuj esperantistoj-idealistoj. Tiun ĉi ideon ĉiu povas klarigi kaj formuli al si tiel, kiel diktas al li lia propra kapo kaj koro. Permesu al mi, ke mi raportu al vi, kiamaniere **mi** komprenas tiun ideon.

Sed por eviti ĉiun malkompreniĝon, mi devas antaŭ cio atentigi vin, ke tio, pri kio mi nun parolos, prezentas miajn principojn pure **personajn** kaj **privatajn**. Mi ne sole ne proponas al vi ilian akcepton, sed mi eĉ ne demandas vian opinion pri ili. Mi simple nur raportos.

Mi parolos al vi pri tio, pri kio multaj el vi jam ion aŭdis — nome pri la "Homaran-

ismo". Ne ektimu, sinjoroj! Mi scias, ke oni prezentis al vi la aferon kiel ion teruran, kiel grandan danĝeron por Esperanto. Estu paciencaj, aŭskultu kaj juĝu.

Mi neniam havis la intencion paroli en kongreso esperantista pri miaj privataj principoj kaj kredoj, kiuj estas formulitaj en la homaranismo. Antaŭ dek monatoj mi supozis, ke en la Ĝeneva kongreso mi eble en unu el la kunvenoj pure **privataj** priparolos miajn principojn; sed baldaŭ mi eĉ tiun ĉi mian intencion tute forĵetis. Dezirante, ke la mondo vidu en mi nur la aŭtoron de Esperanto, mi decidis kaŝi por ĉiam mian nomon kiel iniciatoron de la homaranismo, mi transdonis mian principaron al kelkaj amikoj kaj mi petis ilin, ke ili laboru.

Sed la cirkonstancoj aranĝiĝis tiamaniere, ke mi estas

nun devigata ne sole forigi mian kaŝitecon, sed eĉ fari tion ĉi tute **publike**.

En la komenco de tiu ĉi jaro, en la nomo de grupo da personoj, kiuj akceptis por si la nomon "Unua Grupo Homarana", aperis la unua broŝuro pri la homaranismo, kiu devis esti nur prova balono, por aŭskulti diversajn opiniojn. Sed malgraŭ ke en la broŝuro estis klare dirite, ke ĝia teksto estas nur provizora kaj poste perfektigota, kaj malgraŭ ke la broŝuro volis prezenti nur principaron tute **privatan**, al neniu altrudatan, kelkaj esperantistoj, anstataŭ trankvile kritiki la aferon, komencis akran atakadon kontraŭ ĝi. Tiuj ĉi atakoj devigis min forigi mian kaŝitecon, ĉar plua kaŝiteco povus pensigi, ke mi kaŝas min kontraŭ la batoj, aŭ ke mi hontas kaj timas konfesi publike miajn principojn; kaj ĉar oni baldaŭ komencis rakontadi, ke la iniciatoro de la homaranismo estas la aŭtoro de Esperanto kaj ke mi havas iajn kontraŭnaturajn principojn, kiuj baldaŭ pereigos la tutan aferon Esperantan, tial — por meti finon al ĉiuj suspektoj kaj malĝustaj famoj — mi en la lasta monato antaŭ la kon-

greso decidis proklami miajn principojn tute **publike** en mia kongresa parolo.

Tiujn ĉi principojn mi nun prezentos al vi en formo de Deklaracio, kiun mi kaj miaj samprincipanoj akceptis por ni. Sed mi ripetas, ke la Deklaracio, kiun mi legos al vi, prezentas principojn **pure privatajn** de mi kaj de la Unua Grupo Homarana; por la mondo esperantista ili havas nenion devigan.

La Homaranismo estas celado al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco. En ĉiu lando tiu gento, kiu prezentas la plimulton kaj kutimis regi super la aliaj gentoj, longe ne komprenos la homaranismon; sed neniu gento povas scii, kio estos kun ĝi morgaŭ, kaj, pli aŭ malpli frue, ĉiuj honestaj homoj konvinkigos, ke regado per fortoj konvenas al bestoj, sed ne al homoj; kaj ke paca vivado sur la tero kaj ĉeso de militoj estas ebla ne per malfortikaj kaj maljustaj kompromisoj, sed nur per justeco absoluta, egala por ĉiuj gentoj, lokoj kaj tempoj. Tian justecon penas esprimi la Deklaracio de la Homaranoj.

Ĉar pro tiu aŭ alia nelerta aŭ nepreciza esprimo en la Deklaracio la malamikoj de la homaranismo atakas la tutan esencon de la afero, tial mi ripetas la vortojn, kiuj per grandaj kaj grasaj literoj estis presitaj en la unua broŝuro

pri la homaranismo, nome : la nuna teksto de la Deklaracio estas nur provizora ; la definitiva teksto estos fiksita nur iam poste, post sufiĉe matura interkonsiliĝo inter ĉiuj grupoj homaranaj.

DEKLARACIO DE HOMARANO (1)

1.

Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj kaj idealoj honeste patrolandaj ; ĉiajn idealojn genteŝovinismajn, kiuj semas malamon inter la gentoj kaj celas la regadon de unu gento super aliaj, mi rigardas nur kiel grupan egoismon, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

2.

Mi kredas, ke ĉiuj gentoj estas egalrajtaj partoj de la homaro, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj, sed ne laŭ lia deveno. Ĉian ofendadon aŭ persekutadon de homo por tio, ke li naskiĝis de alia gento, kun alia lingvo aŭ religio ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

3.

Mi kredas, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj konstantaj loĝantoj, kian ajn lingvon aŭ religion ili havas ; la intermiksadon de la interesoj de lando kun la interesoj de tiu aŭ alia gento, lingvo aŭ religio mi rigardas kiel restaĵojn el la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

(1) Kvankam tiu Deklaracio estis jam publikigita en "Originala Verkaro" (pĝ 326-8), ni donas ĝin ĉi tie, unue ĉar ĝia teksto estas sufiĉe malsimila al tiu de la du broŝuroj, due ĉar ĝi estis malofte citita kaj tre malmultaj ĝin konas.

4.

Mi kredas, ke en sia familia vivo ĉiu homo havas plenan naturan kaj nedisputeblan rajton paroli, kian lingvon aŭ dialekton li volas, kaj konfesi, kian religion li volas ; sed en komuniĝado kun homoj de alia deveno li devas, kiom ĝi estas ebla, celadi al uzado de lingvo neŭtrale-homa kaj al vivado laŭ religiaj principoj neŭtrale-homaj. Ĉiun celadon de unu homo altrudi al aliaj homoj sian lingvon aŭ religion, se tion ĉi ne postulas absoluta neceseco, mi rigardas kiel barbarecon.

5.

Mia patrujo mi nomas tiun regnon, aŭ en granda regno ankoraŭ speciale tiun provincon, en kiu mi naskiĝis, aŭ en kiu mi por ĉiam enloĝiĝis, kaj mi neniam devas nomi mia patrujo ian fremdan teritorion pro tio, ke tie pleje loĝas aŭ iam regis mia gento. Sed por ke en mia patrujo unuj filoj ne estu rigardataj kiel mastroj, kaj aliaj tiel same naturaj filoj ne estu rigardataj kiel fremduloj kaj ne bezonu revii pri alia patrujo, mi devas ĉiam celadi al tio, ke nek mia regno, nek mia provinco portu la nomon de ia gento, sed ĝi portu nomon neŭtrale-geografian.

6.

Patriotismo aŭ servado al la patrujo mi nomas nur la servadon al la bono de ĉiuj miaj sampatrujanoj, de kia ajn deveno, lingvo aŭ religio ili estas ; la servadon speciale al la gentaj interesoj, lingvo aŭ religio de tiu loĝantaro, kiu en la lando prezentas la plimulton, mi neniam devas nomi patriotismo.

7.

Konforme al la principo, ke unuj regnantoj, eĉ se ili prezentas en la lando grandegan plimulton, ne havas moralan rajton altrudi sian lingvon aŭ religion al la aliaj regnantoj, mi devas penadi, ke en mia lando ĉiu gento havu la rajton fondi por siaj membroj lernejojn kaj aliajn instituciojn kun sia lingvo kaj sia religio, sed ke por ĉiuj regnantoj, kiuj ne

deziras uzadi tiun aŭ alian gentan lingvon aŭ religion, ekzistu lernejoj kaj institucioj kun neŭtrale-homa lingvo internacia kaj kun moroj kaj festoj neŭtrale-homaj aŭ neŭtrale-regnaj.

8.

Mia nacio mi nomas la tutecon de ĉiuj homoj, kiuj loĝas mian patrujon, de kia ajn deveno, lingvo aŭ religio ili estas ; la aron de ĉiuj homoj, kiuj havas saman **devenon**, kiel mi, mi nomas mia **gento**. Mian nacion mi neniam devas nomi per la nomo de ia gento, mi devas ĉiam nomi ĝin per la neŭtrale-geografia nomo de mia patrujo ; se mia patrujo ne havas ankoraŭ alian nomon, krom nomo genta, mi devas anstataŭ la esprimo " tia nacio " uzadi la esprimon " tialanda nacio ".

9.

Mia lingvo mi nomas tiun lingvon, kiun mi persone plej bone scias kaj plej volonte uzas, kaj en la elekto de tiu ĉi lingvo mi havas plenan liberecon. La lingvon, kiun mi parolis en mia infaneco kun miaj gepatroj, mi nomas mia lingvo gepatra ; la lingvon, kiun mi uzas en mia familio, mi nomas mia lingvo familia ; la lingvo, kiu apartenas al mia gento, mi nomas mia lingvo genta ; sed nenian lingvon mi devas nomi mia lingvo nacia aŭ landa, ĉar, kvankam estas tre aprobinde, se ĉiuj loĝantoj de unu lando memvole uzas unu lingvon, tamen en principo nenia lando nek ĝia loĝantaro devas esti ligita kun la lingvo de unu el ĝiaj gentoj. Krom mia persona lingvo mi devas posedi ankaŭ lingvon internacian, por ke mi sen genta altrudemeco povu ĝin uzi en komunikiĝoj kun tiuj personoj, por kiuj mia propra lingvo estas fremda.

Rimarko. Ĉis la tempo, kiam la demando pri lingvo internacia estos decidita per aŭtoritata interkonsento de la registaroj, la demandon pri tio, kiu lingvo devas esti rigardata kiel neŭtrala, ĉiu grupo homarana povas decidi laŭ sia propra bontrovo.

10.

Mia religio mi nomas tiun religion aŭ filozofian sistemon, en kiu mi naskiĝis, aŭ kiun mi memvole akceptis ; sed al

ĝia nomo mi devas ĉiam aldoni la nomon " homarana " por montri, ke mi konfesas ĝin laŭ la religiaj principoj de la homaranismo, kiuj konsistas en jeno :

a) Sub la nomo Dio, kiam mi uzas tiun ĉi vorton, mi komprenas tiun misteran plej altan Forton, kiu regas la mondon kaj kies esencon ĉiu havas rajton klarigi al si tiel, kiel diktas al li lia eklezio, se li estas homo kredanta, aŭ lia saĝo kaj koro, se li estas liberpensulo. Neniam mi devas altrudi mian ideon pri Dio al aliaj personoj, kiuj havas pri Dio alian ideon ol mi.

b) Kiel fundamentan, por ĉiuj homoj devigan religian leĝon mi rigardas la regulon : " agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras, ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco ". La tutan ceteran parton de ĉiu religio mi rigardas kiel parton eklezian, kiun ĉiu havas la rajton plenumadi laŭ la montroj de lia propra eklezio, se li estas homo kredanta, aŭ rigardadi kiel morojn de lia gento, se li estas liberpensulo. Neniam mi devas mallaŭdi iun pro lia religio, se li naskiĝis en ĝi kaj ne volas perfidi sian genton, ĉar en ĉiu religio oni povas esti homo bona aŭ malbona ; neniam mi devas ofendi la religian senton de persono, havanta alian religion aŭ kredon ol mi ; neniam mi devas atribui al iu mian propran religion aŭ kredon.

c) Konsciante, ke neiu havas la rajton altrudi al alia la morojn kaj festojn de sia religio, mi povas plenumadi la morojn de mia religio en mia vivo persona kaj familia, sed en komunikiĝado kun homoj de aliaj religioj mi devas — kiom ĝi ne kontraŭas al miaj religiaj konvinkoj — plenumadi morojn kaj festojn neŭtrale-homajn, akceptitajn per reciproka interkonsento de homaranoj de diversaj religioj.

11.

Konsciante, ke la ĉefa celo de ĉiu honesta religio devas esti fratigado de la homoj, kaj ke la malamo inter la homoj neniam ĉesos, ĝis la homoj alkitimiĝos apartigadi la fundamentajn religiajn leĝojn, enskribitajn egaltekste en la koro de ĉiu homo, de la leĝoj ekleziaj, prezentantaj privatan apart-

enaĵon de ĉiu eklezio aparte — mi devas helpi al tio, ke en mia urbo, kiam la nombro de la homaranoj en ĝi estos sufiĉe granda, paralele kun la temploj de la diversaj eklezioj ekzistu ankaŭ templo neŭtrale-homa, en kiu diversaj religie etikaj demandoj estos priparolataj en spirito neŭtrale-homa, sen iaj gente-ekleziaj almiksaĵoj, kaj kie sen ia peko kontraŭ siaj religiaj konvinkoj povos frate kunvenadi homoj de ĉiuj religioj kaj de ĉiuj filozofiaj sistemoj, kaj tie kune kaj reciproke tolereme servi al tiu granda morala Forto, kiun ĉiu el ni sentas, kvankam ĉiu malsame nomas kaj prezentas.

12.

Konsciante, ke neniam eĉ plej bonaj teoriaj principoj havas ian forton, se ili ne estas konstante aplikataj praktike, mi devas aparteni al ia grupo homarana kaj partopreni persone aŭ per korespondado en ĝiaj kunvenoj, kiuj havas la karakteron de senĝenaj amikaj kunvenoj de samprincipanoj. En tiuj kunvenoj mi devas, kiom ĝi estas ebla, uzadi lingvon neŭtrale-homan kaj morojn neŭtrale-homajn.

* * *

Sinjorinoj kaj Sinjoroj! Mi klarigis al vi, kiamaniere mi persone komprenas la internan ideon de la esperantismo, mi, kiu de la infaneco ĝis nun ĉiam vidis antaŭ mi murojn interpopolajn, kaj kies tuta vivo estis ĉiam ligita kun la ideo de Esperanto. Sed mi esprimis al vi mian opinion tute **privatan**, kiun ĉiu el vi povas akcepti aŭ malakcepti. Tiuj el vi, kiuj mian opinion pri la interna ideo de la esperantismo trovas neĝusta, povas simple ne akcepti ĝin, kaj ili tute ne devas timi de la homaranismo ian danĝeron por Esperanto, ili povas montri al la tuta mondo la Bulonjan Deklaracion kaj diri al la mondo, ke la homaranismo prezentas ne la principaron de la tuta esperantistaro, sed nur la tute privatan principaron de tiu esperantista partio, kiu nomas sin homaranoj, kaj al kiu tute private apartenas ankaŭ la aŭtoro de Esperanto, kiu, simile al ĉiu homo, havas ja la rajton posedi siajn privatajn principojn; sed tiuj el vi, kiuj trovas, ke mia opinio pri la ideo de la esperantismo estas ĝusta, ne lasu vin konfuzi, ne timu la atakontajn ŝovinistojn aŭ rutinulojn, kredu, ke de iliaj senkaŭzaj atakoj Esperanto ne pereos, kiel ĝi ne pereis

ĝis nun, malgraŭ multaj miloj da atakantoj. Ni respondadu a! ili kuraĝe : " Tiun kulpon kaj hontigon, kiun vi ĵetas sur nin, ni ĝin akceptas malkaŝe kaj fiere, ĉar en nia celado, kiu tiel malplaĉas al vi, ni vidas nenion krom bela kaj bona." Amikoj, ne timu konstante pri tio, kion diros la sence kritikanta kaj grimacanta rutina mondo, sed agu ĉiam tiel, kiel diktas al vi via konscienco kaj koro. Kredu, ke ĉio, kio per si mem estas bona kaj justa, malgraŭ ĉiuj insultoj pli aŭ malpli frue devas venki kaj nepre venkos. En la daŭro de dek naŭ jaroj ni ĉiam kantadis pri la nova sento, kiu venis en la mondon — nun, ni ne fariĝu timuloj, kaj laŭ la vortoj de nia himno ni ne ĉesu labori por nia idealo de intergenta frateco, " ĝis la bela sonĝo de l' homaro por eterna ben' efektiviĝos ! "

K. KALOCSAY

LA KLASIKA METRIKO KAJ ESPERANTO

II

Sed ankaŭ la tempomezura metriko ne formortis tute. En la ĉeha lingvo, laŭ la informo de amiko Pumphr, oni faris per ĝi persistajn eksperimentojn, kaj inter la eksperimentantoj estis ankaŭ poetoj grandaj. Ĉi tiuj ankaŭ brile sukcesis pri la versoj mem, sed ne sukcesis pri ties akceptigo ; kiel mi vidas, la malbeninda skandalo tie kompromitis ĉi tiun metrikon, por kiu la ĉeha lingvo, laŭ la specimenoj, kiujn mi legis, estas perfekte taŭĝa.

Tiel do ni venas nun al la lasta azilo, kie la tempomezura ritmo ankoraŭ daŭrigas

sian vivon : al la hungara poezio. Laŭ mia scio, vere la hungara lingvo estas la sola, kie tiu metriko vivas kaj floras ekde 200 jaroj, donis formon al majstroverkoj, al veraj naciaj trezoroj (ekzemple la granda nacia Epopeo) kaj estas ĝis nun uzata, eĉ de plej modernaj poetoj. Ekz-e Radnoti, malfeliĉa viktimo de la hitleranoj, verkis inter la du miloj apud superrealismaj poemoj eklogojn en heksametroj.

Permesu, kara leganto, ke mi skribu ĉi tie unu heksametron en tiu lingvo strange nekonata :

Napkelet ifjainak dobogô paripâi tiportâk...

Se vi pronocos la vokalojn supersignitajn longe, tire; la sensupersignajn mallonge kaj metas fortan akcenton sur la unuan silabon de ĉiu vorto (ne longigante tamen per tio la silabon), vi havos en viaj oreloj perfekte la muzikon de la greka heksametro.

Kompreneble, la hungara poezio ne konsistas sole el klasikformaj poemoj, eĉ, ili estas hodiaŭ jam sporadaj. Tamen la klasika metriko penetris ankaŭ en la modernajn ritmojn: la "Fino de Septembro" de Petöfi (vd. Hungara Antologio) sonoras ekz-e per perfektaj daktiloj tempomezuraj; eble pro tio ĝin rigardas kelkaj la plej bela hungara poemo. La "Vojo" de Zamenhof estus tradukebla hungarlingven nur per tempomezure puraj daktiloj.

Pardonu, ke tiom mi okupiĝas pri la hungara prozodio. Sed tiamaniere estos al vi klare, kial ĝuste hungaro, kun siajn "grekajn" oreloj, rompas al si la kapon, kiel eksonigi Esperante la klasikajn poemojn; kial ĝuste hungaro klopodas vin konverti (aŭ delogi) por la apreco de la tempomezure pura metriko.

31 Jes, ĉar nun ni revenas tien,

kie ni komencis, al la Esperanta heksametro. Kofman kaj Vallienne, kiel ni vidis, adaptis la germanan solvon de la demando. Kaj mi jam diris, eĉ aŭdacis tion pravi per via sinteno, ke tiu solvo estas nekontentiga. Kial?

Nu, mi detale eksplikis la malavantaĝojn de la solvo en la germana lingvo mem. Sed, vi diros, tio tamen ne malhelpis grandajn poetojn krei en tiu formo ĉefverkojn. Se tiu formo estis konvena al la germanoj, rusoj kaj italoj, kial estus do pli pretendemaj la esperantistoj?

Jen kial: en Esperanto atakas la heksametron ankoraŭ ties plej malica malamiko: la **amfibrako** (o — o), ĉi tiu filoksero de ritmo, ĉar kiel la filoksero pereigas la radikojn de la vinarbeto, tiel ĝi dismordas la piedojn de la versoj.

Ni konstatis, ke en la akcenta versfarado la vortoj ricevas duoblan emfazon: tiun de la akcento kaj tiun de la forta ritmotempo, koincidanta kun la akcento. La duobla emfazo forte ellevas la vortojn, kvazaŭ memstarigas ilin. Tiel do la verso ne konsistas el kontinua versoŝtofo, kiel la tempomezura, sed el

mozaiko de memstariĝintaj vortoj. El tio sekvas, ke en la ritmo validiĝas la ritmoskemo de la unuopaj vortoj.

La pulson de la akcentaj ritmoj do difinas ne la intenco de la poeto, sed tio, kia estas la reganta ritmoskemo de la unuopaj vortoj en la respektiva lingvo. Ni vidis, ke la germana lingvo havas relative multajn daktilajn vortojn, la

rusa lingvo eĉ pli abundas je ili. Tute kontraŭe, en Esperanto mankas la daktilaj vortoj, kaj, laŭ la kalkuloj de Waringhien, 39 % de la vortmaterialo havas ritmon amfibrakan. Sekve, la vortoj, potencigitaj per la ritmo, trudas al la triopaj Esperantaj ritmoj preskaŭ ĉiam amfibrakan skemon. Kiam, ekz-e, oni intencas heksametri jene :

Kantu, diino, koleron de ŝilo Pelea, Ahilo...

la aŭskultanto aŭdos ne kvin sinsekvajn daktilojn :

—oo/—oo/—oo/—oo/—oo/—o

sed unu trokeon kaj kvin amfibrakojn :

—o/o—o/o—o/o—o/o—o/o—o

kaj tio estas katastrofa ! Ĉar, se la daktilo dancas, la amfibrako stumblas. Ne viglajn daktilajn saltetojn faras la verso, sed ĝin ĉiumomente minacas falo : oni dezirus ĝin, kun ĝena sento, apogi kom-

pateme.

Eĉ pli mizera fariĝas la ritmo, se multaj malfortaj tempoj estas reprezentataj per tempomezure longaj senakcentaj silaboj :

Iam mi, kiu sur fluto kampara malpezajn kantadis...

ĉi tie oni jam sentas ne nur stumbladon, sed plenajn falojn, post kiuj la verso devas pene sin relevi ĉiam denove.

Kion fari do ?

Unue ni rigardu, ĉu oni ne povus en Esp-o fari verajn tempomezurajn versojn, en kiuj la akcento kaj la forta tempo ne koincidas nepre.

Nu, por tio ekzistas kelka

eblo. Troviĝas, nome, vortoj en Esp-o, kies akcenta silabo estas mallonga. Tiaj estas la posedaj pronomoj (**mia**, **via** ktp.), la tabelvortoj (**tie**, **ĉia** ktp.), la prepozicioj (**apud**, **super**), la numeralo **unu** kaj eble ankaŭ la dusilabaj vortoj kun akcenta i-vokalo (**pia**, **dia**). Se tiujn antaŭas aposrofita substantivo aŭ unusilabaĵo, estiĝas piedo perfekte

daktila : **en mia, post unu, tio** ktp. Tiamaniere oni povas
benk' apud arbo, el super, per fari la jenan distikon :

**Nun super akvoj jam ĉie regis nigro de nokto,
 sed kiel ardis lum' en mia kaj via kor' !**

En tiu ĉi versduo kvinfoje la forta tempo. La skemo
 ne koincidas la akcento kaj estas :

— oo / — — / — oo // — — / — oo / — o
 ! ! ! ! !
 — oo / — — / — // — oo / — oo / —
 ! ! ! ! !

Se oni metas akran akcenton en ĉi tiuj versoj, sed sen la longigo de la respektivaj vokaloj, oni klare sentas (kiel en la greka distiko) diskretan ritmomuzikon de ripozoj kaj saltetoj, kiu akompanas la tekston sendepende de tiu ĉi. Bedaŭrinde, tamen, tiajn ebloj doniĝas relative malofte. La greka efekto ne estas reproduktebla ĝenerale.

La taskon do oni devas redukti je tio, ke laŭeble oni

evitu la amfibrakigadon. Kaj por ĉi tio ni havas ja rimendon : la apostrofadon de la substantivoj. Efektive, la fina akcento, kun sia akra ekfrapo kvazaŭ alkaptas la sekvantajn du malfortajn silabojn formante kun tiuj daktilon (**benk'apud arbo, voĉ'de la patro, vent' furioza, hom', kiu venis**). Do, multigante la apostrofojn en la unua heksametro de la Iliado, oni povas elimini la amfibrakojn. Fakte :

Kantu, diin', pri koler' de la fil' de Peleo, Ahilo...

havas tute bonan heksametro-efekton. Sed, bedaŭrinde la multaj apostrofoj ne estas bonvenaj en Esp-o. Sekve, ju pli bona estas la heksametro ritme, des pli malbona ĝi estas lingve.

Oni devis do fari kompro-

mison : postuli almenaŭ unu apostrofon en ĉiu verso, plej konsilinde en la loko de la "regula" cezuro, t.e. post la forta tempo de la tria piedo ; ĝin povas anstataŭi ankaŭ unusilaba vorto (jam, nun, per ktp.) :

**Min kompatas najbar', sed eĉ sonĝe vi min ne kompatas,
 tion memoros vi ja iam kun nigra harar'.**

Kiel videble, la senakcentajn, sed tempomezure longajn silabojn oni rigardas hibridaj, kaj uzas ilin jen kiel longajn en la dua tempo de spondeo, jen kiel mallongajn en daktiloj: **min kompatas najbar'** (— — / — oo/—).

Iel instinkte mi sentis, ke ĉi tiu solvo ne estas tute bona, sed en la ĝojo, ke mi trovis ian solvon, kaj en la fervoro de la tradukado (**Romaj Elegioj** de Goethe) mi subpremias en mi la voĉon de la kritiko. Tiun ĉi prozodion mi eĉ rekomendis en **Lingvo Stilo Formo** ankaŭ al aliaj heksametramuloj kaj, mia kulpo, kelkajn ankaŭ delogis. Nun mi solene kaj pente revokas tiun rekomendon.

**Vintro de venta veter' malaperis el altoj eteraj,
florportanta sezon' purpure jam al ni ridetas...
De l' herbnutra Eos donaciĝas ros' delikata,
floras ride la kamp', sin apertas ride la rozoj...
Kantas jam birdar' ĉiarasa kun ega jubilo,
supre de maro la mev', ĉe la tegmentrand' la hirundoj.
boske la najtingal', ĉe la bordo rivera la cigno...**

ktp. (la tuton oni povas legi en la Nica Revuo N-o 15.)

Efektive, ĉi tiu formo, unuiganta en si la akcentan kaj la tempomezuran prozodion (Pumpr ĝin tial nomis dudimensia versfarado) estas facilkura, ĉar ĉiuj malfortaj tempoj estas tempomezure mallongaj, "hibridaj" estas

Mian sekretan malkontenton konsciigis en mi la recenzo de Waringhien pri la Romaj Elegioj, parolante pri la malglateco de la tekstoj. Ve, li estas prava — mi ĝemis, la problemo do ne estas solvita.

En mia malespero mi komencis fajli, glatigi kaj poluri unu mian tradukon heksametrans en la **Eterna Bukedo**, la "Printempon" de Meleagros. Dum longega tempo kun longaj intermitoj re- kaj re-laborante, fine mi elkovis la tekston kun pura tempomezura metriko, en kiu, tamen, pro la naturo de Esperanto, la fortaj tempoj preskaŭ ĉiam estas ne nur longaj, sed ankaŭ akcentaj:

nur la silaboj, kies vokalon sekvas "muta" kun "likvida" (tr, fl, pr). Pro tio ĝi estas tiel glite ondanta, kvazaŭ oleita. Kaj, malgraŭ la koincido de la fortaj tempoj kaj akcentoj, ĝi tamen ne amfibrakiĝadas, ĉar la pureco de la metriko kvazaŭ trasingas la langon sur la mal-

longaj silaboj ĝis la sekvanta forta tempo, krome la daktil-efekton helpas ankaŭ la cezuro post la forta tempo de la tria piedo, kaj la ofta ripetigo de la piedparo — — / — oo (florportanta se... ; floras ride la... ; jam birdar' ĉia...). Oni povus riproĉi nur la iom barbaran akrecon de la ritmo-frapoj.

Sed la granda hiko estas, ke fari tiajn versojn estas ekstreme malfacile. En Esperanto, nome, relative malmultaj vortoj komenciĝas per vokalo kaj relative ofte oni renkontas vortfinan konsonanton (preskaŭ ĉiuj verboj, akuzativo, pluralo); ĉi tio evidente malfavoras al faro de daktiloj. Oni povas ja loki puran daktilon tie ĉi kaj tie, eĉ unu aŭ dufoje en ĉiu sespiedo, sed densa daktileco kiel la Homera, ne estas aplikbla en longaj poemoj epikaj aŭ elegiaj. Oni povus ja mal-

pliigi la nombron de la daktiloj kaj ĉi tiujn konservi nur en la antaŭlasta piedo, sed tia skemo estas tro mallonga rilate al la greka heksametro kaj krome ankaŭ spondeojn ne estas facile tiel amasigi.

Mi konfesas, ke spertante kaj trapensante ĉion ĉi, mi senkuraĝiĝis. Kaj en tia kriza animstato mi decidis, ke mi rezignos pri la tuta tempomezura metriko, kaj la poemojn de Catullus, per kiuj mi komencis la Antologion, mi tradukos en modernaj ritmoj, kun rimoj. Kaj tion mi ankaŭ faris.

Tamen, per tio mi solvis nenion. Catullus estas lirikisto, liaj poemoj, speciale tiuj al Lesbia, estas kvazaŭaj kanzonoj, tute bone do konvenas al ili la modernaj kantformoj. Sed kio pri la epopeoj de Homero aŭ Vergilo, ekzemple? Nur, mi faris provojn pri la Odiseado en oktrokeoj kun rimoj:

**Muzo, kantu la sagacan viron, kiu longan vojon
trasuferis inter penoj, detruinte sanktan Trojon...**

sed, ĉu ne, tio estas tute malgreka.

Nun mi ekhavis la ideon: kio estus, se, restante ĉe la oktrokeoj, mi ornamus ilin anstataŭ rimoj per daktiloj tempomezure puraj? Kaj en

tia formo mi tradukis la Aman Dialogon de Theokrite (vd. Nica Revuo, N-o 11), metante origine po du aŭ tri daktilojn anstataŭ trokeoj en ĉiu verso. La tradukon mi sendis al amiko Waringhien,

kaj li konsultis pri ĝi ankaŭ la koboldojn tiutempe paŝtatajn ankoraŭ de Raymond Schwartz. Oni ĝenerale trovis, ke la versoj estas kaosaj : la kompatindaj oreloj ne povas sin ĝuste orienti en la versoj longaj kaj konstante ŝanĝantaj sian silabnombron.

Kompreneble, mi pensis, la francaj oreloj ne povas alie imagi verson, ol kun silabnombroj egalaj ! Tamen, aliflanke, la tiel pliampleksigata oktrokeo estis efektive tro longa rilate al la heksametro. Tiam mi decidis meti en unu verso nur **unu tempomezure**

puran daktilon kaj ĉiam en la **dua hemistiko**. Komence mi intencis loki tiun daktilon ĉiam en la antaŭlasta silabo, sed poste mi rekonis, ke la verso fariĝas pli varia, se la loko de la daktilo alternas inter la tri antaŭlastaj piedoj :

—α/—o/—o/—o//
 —o/—o/—oo/—o
 —o/—oo/—o/—o
 —oo/—o/—o/—o

Sed tia skemo nenion diras al la leganto. Por ĝin viviĝi, jen estas ekzemple : la traduko de la komenco de **I'Rerum Natura** de Lucretius :

*Eneid-patrin', plezuro de la homoj kaj de la dioj,
 ĉionutra sankta Venus sub la ĉielaj signoj vibraj,
 kiu maron ŝipoportan, kiu kampojn fruktogenerajn
 plenplenigas, ĉar ja ĉiu raso vivanta sur la tero
 per vi koncipiĝas vidi naskiĝinte la sunolumon,
 ho Diino, de vi fuĝas vento, fuĝas nubo ĉiela,
 kaj ĉe via veno al vi mildajn florojn sub la piedojn
 sternas la artlerta tero, marspegulo vin alridetas,
 paciĝinte la ĉielo brilas per radioj inundaj,
 ĉar ja, kiam sin ekmontras la printempa vizaĝ' de l' jaro
 kaj zefiro fekundiga jam kun flugo libera freŝas,
 tuj la birdoj de l' aero vin anoncas, vian aliron
 signas, ho Diin', kun koro, kiun via forto batigas.
 Ankaŭ la sovaĝaj brutoj vagas tra l' paŝtejo serena,
 naĝas tra l' rapidaj fluoj, tiel sekvas vin, de sopira
 sorĉo ekkapitaj, tien, kien ilin gvidi vi degnas ;
 sume : tra la maroj, montoj, kureganta flu' de riveroj,
 foliar-portantaj domoj de l' birdaro, verdo de kampoj,
 ĉies bruston vi ekbatas por la vek' de amo belega,
 por ke ĉiuj sian rason plimultigu per ard' amora.*

La pentameton oni povas unu silabon. Por ekzemplo fari simple per la vira finiĝo staru ĉi tie epigramo de de la verso, depreninte tiel Paulos Silentarios :

*Doris el la riĉaj bukloj ŝiris unu haron el oro,
per ĝi, kiel al kaptito, al mi la manojn ligis ŝi.
Mi komence nur ridegis, ĉar mi pensis, ke tre facile
el la lig' de P ĉarma Doris eskapigi mi povos min.
Sed kiam mi ne kapablis rompi ĝin, mi komencis ĝemi,
kiel iu katenita per fortika ĉeno de fer'.
Eĉ nun, priplorinde povra, sur ĉi tiu haro mi pendas,
per ĝi tien kaj ĉi tien tiras min la kapriculin'.*

Kiel oni vidas, la daktiloj ofte ŝanĝas sian lokon, ili troviĝas ekz-e en la Venusalvoko jen en la unua piedo de la dua hemistiko (vv. 2., 4.), jen en ties dua piedo (vv. 5., 8., 10., 11.), jen en la tria (vv. 1., 3., 6., 7., 9., 12-19).

Jen do la skemo longe serĉata ! Ĉu vere trovita ?

” Sian ĉevalon laŭdas ĉiu cigano ” — diras hungara proverbo. Mi diros do, kiajn bonajn kvalitojn havas ĉi tiu heksametro-surogato, kiun mi nomas **oktometro**.

1. Ĉi havas ĝustan amplekson : 17 silabojn ; tio estas la silabmaksimumo de la greka-latina heksametro.

2. Ĉi estas nesimetria, kiel la heksametro ; ĉi ties unua hemistiko, nome, finiĝas post la forta tempo aŭ post la unua malforta tempo de la tria piedo, do post la 7-a aŭ 8-a

silabo de la 17-silaba verso.

3. Ĉi havas konstantan silabnombron (do estas akceptebla de francoj), kaj konstantan piednombron (do estas akceptebla de germanoj kaj angloj).

4. Ĉi ne estas seninteresa verso. La daktiloj, kiuj aperas varie en la piedoj de la dua hemistiko, prezentas ion refreŝigan, oreldistran. Amiko Pumpr riproĉis, ke la daktilo en la antaŭlasta piedo venas iel prokrastiĝe, kaj ĝia malfruo estigas ian streĉon. Nu, laŭ mia sento, tio estas ĝuste avantaĝo : oni streĉe atendas je la duobla salteto, kiu ree kaj ree savas la version el la monotono de la nura trokeeco ; per tio de verso al verso ripetiĝas la senpacienco kaj la kontentiĝo. Ne por la okuloj estas ĉi tiu skemo : oni eble vidos kun malfido la longajn liniojn. Sed la oreloj

baldaŭ al kutimiĝas, dum deklamo la versoj efektive katenas la ritmosenton. en ili la daktiloj estas ĉiam kvazaŭ etaj aventuroj, ne malpli ver-sefektaj ol la rimoj.

5. Ĝi estas tre bone manipulebla, ne postulas apostrofadojn, estas ĉielkonforma al la naturo de nia lingvo. Pli ol dumil tiajn versojn mi faris ĝis nun, do mi povas diri el praktiko, ke ĝi estas ne tro malfacila, sed tamen ne tiom facila, ke ĝi ne postulus de la poeto kelkan klopodon kaj trovemon, sen kiuj la poezio ĉesus esti arto.

Mi aldonas ankoraŭ, ke la daktiloj, ĝuste ĉar en unu verso troviĝas nur unu el ili, devas esti tute puraj. Eĉ "muta" kun "likvida" (br, tr, fl, kl ktp.) ne sekvu mallongan silabon, almenaŭ ne en la unua malforta tempo de la daktilo. En la dua malforta

tempo tia licenco malpli ĝenas, do **granda sekreto** estas allasebla, sed **glav' akrigita** estas malkonsilinda.

Mi kredas, ke ĉi tiu skemo estas vere uzebla kaj uzinda.

Jes, oni diros (almenaŭ mi esperas, ke oni jesos), sed tio estas tute senprecedenca, senekzempla. Tia versformo nenie ekzistis iam, do ankaŭ en Esperanto ne povas ekzisti.

Efektive, precize tia sama verso nenie estas trovebla. Sed ion parenčan oni trovas, eĉ en loko tre nobla, en lingvo plej proksima al la komuna pralingvo de grekoj, latinoj, ĝermanoj kaj slavoj: en la sanskrito ⁽¹⁾. La plej ofte uzata verso de la grandaj antikvaj epopeoj Mahabharata kaj Ramajana estas la "sloka", kiu similas al la proponita oktometro dumaniere: unue, ĝi estas deksexsilaba, kaj due, ĝi havas strik-

(1) Fakte, atribuante la kreon de la tempomezura metriko ekskluzive al la grekoj, mi estis maljusta kontraŭ la hindoj. Jam en la antikvaj epopeoj ni trovas metrikon parte tempomezuran (16-silaba "sloka" kaj 11-silaba "triŝtub"), kaj en la mezepoko, ekde la kvina jarcento kreiĝas prozodio strikte fiksita, kiel ĉe la helenoj, kaj tre, eĉ tro varia. Unu el la skemoj ("upaĝati") estas preskaŭ identa kun la sapfa verso, sed multaj el ili estas tiel komplikaj, ke oni tre malfacile orientiĝas, precipe pro la 3-6-opaj serioj da mallongaj silaboj. La kulminon tiu ritma arto atingas en la heptametroj de Ĉajadeva (12. jc.), kiuj konsistas el ses daktiloj kaj unu trokeo; anstataŭ daktilo povas stari ankaŭ prokeleŭsmo (oooo). Sed Ĉajadeva, per tio, ke li komencas sisteme uzi ankaŭ rimojn, samtempe ruinigas la tempomezuran metrikon: post li la hinda verso jam fariĝas akcenta kaj rima, kaj restas tia ĝis nun.

tan tempomezuran skemon en po tri silaboj de siaj du hemistikoj, en la ceteraj po kvin silaboj la ritmo estas nedefinita. Iom simila verso troviĝas en la kristanaj epeoj de la triacentjara Commodianus, kies heksametroj estas akcentaj en la kvar unuaj piedoj, sed severe tempomezuraj en la kvina. Oni povas diri, ke la Esperanta oktometro estas hibrido de tiuj du versformoj: la sanskrita "sloka" kaj la latina heksametro de Commodianus. El ĉi lasta ĝi havas la descendan (trokean-daktilan) marŝmanieron, el la "sloka" la piednombron, el ambaŭ tion, ke la tempomezura metriko regas nur en unu parto de la verso. Eble ĝi memorigas per sia hibrideco ankaŭ pri la poezio de Hilarius (315-367), la unua kristan-latina himnisto, kiu kun granda peno klopodis interkonformigi la akcentan prozodion de la siria himnisto Ephrem kun la tempomezura metriko, farante tiel la unuan balbutadon de la grandfutura poezio de "amor sanctus". Jes, ankaŭ la oktometro estas iom balbuta apud la heroaj sespiedoj de Homero, sed tamen, per sia pura daktilo en ĉiu sia verso, ĝi havas almenaŭ radieton el la

helena brilego.

Ju pli multe mi laboris per la oktometro, des pli ĝi plaĉis al mi. Nu, tio ne diras multe: oni povas diri, ke mi estas subaĉetita favore al mia propra infano. Tial mi komencis konsulti diversnaciajn versespertojn.

Tárkony kaj Szilágyi kaj Baghy donis favorajn opiniojn, sed tio ne estas kalkulebla, ĉar ili estas hungaroj, do infektitaj de tempomezurero. Ankaŭ Pumpr, kiu skribis al mi, ke li "komencas frandi" la oktometrojn, estas ege suspektinda: en la ĉeĥa oni ja faris tempomezurajn heksametrojn (eĉ li mem, li konfesis, faris iam tiajn).

El la aliaj — fideblaj — versespertoj, **Thorsen** trovis la skemon bela, sed ne ekdeziris ĝin uzi pro ĝia komplikeco. **Marjorie Bulton** ŝajnis simple akcepti ĝin sen ia kontraŭdiro, kiel ion naturan. **Morariu** same. **Waringhien** skribis: "Kvankam komence nekutima, tiu nova ritmo estas agrabla kaj libermova"; poste li ankaŭ faris provojn pri ĝia uzo kaj ne sensukcese, tamen, li plendas, ke tiuj mallongaj silaboj ĝenerale ne emas trafi ĝuste tien, kien ili devus (kompreneble por tia esence nova entrepreno necesas kelka

ekzerciĝado ĝis la akiro de rutino). **Foote** trovas la skemon plaĉa, kaj la tradukojn, kiujn mi faris tiaforme, tre belaj, tamen li emfazas, ke la ritmo estas " alia varo " ol la antikva heksametro (tion mi ne neas, sed mi insistas, ke al ĉi tiu ĝi estas pli proksime parenca ol la heksametro akcenta). **Rossetti** havis kelkan klopodon pro la ritmo : komence ĝi ŝajnis amuza, poste la ĉiuversaj galopetoj kaj la malekvilibro de la du hemistikoj efikis ĉede, fine, eble kiam li konstatis, ke temas pri daktiloj, kaj li ne emfazis tro la skandadon, li trovis la skemon " pli mola, la kadencan pli lanta kaj ondanta " kaj tiam la ritmo ŝajne konkeris lin : nun ĝi tre plaĉas al li.

Se konsideri, ke " kiom la kapoj, tiom la ĉapoj ", ĉi tiun akcepton oni povas diri favora kaj esperiga. Sed la decida triumfo por mi estis la aventuro de **W. Auld**. En versletero adresita al li mi uzis parte oktometro-distikojn, kaj tiu formo tiel al li ekplaĉis, ke li volis ĝin ankaŭ mem uzi. Kiel li skribis : " Tiu via verso estas por mi tiel obsede bela, ke mi nepre volas ĝin regi. " Kaj li faris provojn, sed malcontentis pri ili : " Tuj mi sentas, ke viaj versoj estas pli

fortaj, tuj mi konstatas, ke la paleco de miaj versoj ne devenas de manko de enhavo, sed de io malbona en la formo, kaj tamen, sentante ĝin, mi ne komprenas la diferencon... "

Nu, la diferenco estis, ke li ne aplikis daktilojn tempomezure purajn, sed nur daktilojn akcentajn, kaj tiel, kompreneble, la verspiedoj amfibrakigis.

Ĉio ĉi pruvas almenaŭ la sekvaĵojn :

1. La tempomezura metriko estas tiel fremda al la oreloj kutimiĝintaj al la akcenta metriko, ke eĉ versartisto kiel Rossetti havas klopodojn, ĝis li amikiĝas al ĝi, kaj eĉ poeto kiel W. Auld, kiu krome bone konas la klasikan heksametron (li eĉ skribis al mi, ke en mia ritmo troviĝas " iom de la regula senreguleco de la klasika heksametro latina "), ne rekonis, ke tio, kio al li plaĉas, kaj kun kiu ne povas rivali liaj akcentaj daktiloj, estas elementoj de la tempomezura metriko.

2. Ĉi tiu metriko, tamen, havas tiel fortan efekton, ke ĝi povas trarompi tiun fremdecon, kaj eĉ ne rekonate enamigi al si la orelojn, almenaŭ la delikatsentajn orelojn de poeto.

Sed ne ĉiu havas la delikatsentajn orelojn de poeto. Kaj tial mi skribas nun ĉi tiun artikolon : helpi, ke oni konsciu per lerno, kion la poeto eksentas per si mem.

Nu, ĉio ĉi ŝajnas eble tro memkonscia. Sed efektive, mi opinias, ke la tempomezura metriko nepre estas aplikebla en Esperanto kun tre klara kaj nepre ĝuebla versefekto, ĉar la lingvo ja havas klarajn vokalojn longajn kaj mallongajn, kaj bone distingitajn konsonantojn, per kio la pozicia longo aŭ mallongo de la vokaloj povas evidentiĝi orelfrape. Nur unu paŝon oni devas fari : elpaŝi el la prozodio de la propra lingvo kaj akomodi la orelojn kaj la ritmosenton al la tempomezuro. Kaj tio valoras la penon, ĉar

per tio oni konformiĝas ne nur al ĉi tiu metriko, sed al la greka-latina metriko ĝenerale : oni ricevas komprenon pri tiel grandatradicia prozodio.

Komprenoble oni devas konfesi, ke la oktometro estas forme malpli riĉa ol la heksometro, sed aliflanke, ĝi estas fakte uzebla kaj eĉ kun agrablaj efektoj.

Kaj mi vere flegas la revon kaj esperon, ke oni lernos koni kaj ami ĉi tiun manieron de versado : versamatoroj plaĉe ĝin aŭdos, poetoj plaĉe ĝin uzos. Kaj ne nur la oktometritaj heksametroj kaj distikoj, sed ankaŭ la aliajn "Eoliajn" form-artaĵojn. Pri ĉi tiuj, tamen, mi parolos en alia artikolo.

Daŭrigota

Rimarko de la Redakcio. — La konkludoj de nia amiko Kalocsay pri la karaktero de la grekaj versoj estas apogitaj de la esploroj, kiujn Antono Meillet registris en sia libro : "La hind-eŭropaj originoj de la grekaj metroj" (Parizo, 1923). Tie li montras, ke eĉ en la greka, oni retrovas multajn spurojn de la relativa libereco de la unua parto de la verso, ĉu la jamba trimetro, ĉu la heksometro ; li rimarkigas cetere, ke la egaleco de unu longa al du mallongaj silaboj estas novigo de la greka metriko, kaj gravas precipe ĉe la heksometro : el tio, kaj el aliaj indikaĵoj, li konkludas, ke la heksometro ne estas de hind-eŭropa origino, sed estis pruntita de la grekaj poetoj el alia civilizo, tre probable la egea. Male, la ĉefa karakterizo de la hind-eŭropa verso estis la harmonia aranĝo de silaboj longaj kaj mallongaj, kun cezuro interne de iom longaj versoj : kio postulis certan nombron da silaboj en ĉiu speco de verso.

JIRI KORINEK

SONETO AUGŬSTA

Ĉi-jare en aŭgusto folioj velkodoras
kaj la aŭtuna spiro sin miksas al somer',
tretita herbo kuŝas palflava sur la ter',
la trompa kant' printempa senglore forsonoras.

Promesojn majo donis, promesoj elvaporas,
aŭgusto ilin prenis, amara estas ver'.
Sole mem oni kulpas! Ĉar vanas jam esper'
aŭtune trovi florojn, kiuj printempe floras...

Sed stulta homa koro denove emas kredi,
ke en ŝtelita suno sur ia sorĉa pad'
eĉ vintre rozo floras kaj eblas ĝin posedi.

El temp-karcer' eskapi, tra ĝia fera krad',
obstine homo provas kaj eĉ ne volas cedi,
se lukto ŝajnas vana pro spito de la fat'.

(16-8-1952).

CH. TRICOU

RENKONTOJ

*Vin ĉiujn mi prirevas, virinojn, junulinojn,
de kiuj — kvazaŭ pintojn sub la nebulkohortoj
ĉe l'horizont' — mi kredis malkovri la animojn,
ĉi kiujn amis mi tra l' misteraj viaj korpoj.*

*Cu vin mi en ĉi mondo revidos fojon plie,
en tiu ĉi vilaĝo, ĉe l'samaj vojomaŝoj,
ĉe tiu sama kurbo de l' pad' soleca, kie
miksiĝis iam niaj nekonatulaĵoj paŝoj?*

*— Vin, ĉefe, kiu, antaŭ ol malaperi ŝtele
tra l' densaj olivarboj, ombritaĵ, de l' vespero,
sekrete returniĝis kun eta trem' pro, eble,
impeto de deziro, malĝojo aŭ espero?*

*De vi nur unu solan rigardon mi ricevis,
sed tiel pete preman kaj tristan kaj enigman,
ke en la kor' por ĉiam ĝi plipeziĝi devis
ĉi mian sortoparton solecan kaj rezignan.*

El la franca trad. R. Bernard.

RAYMOND SCHWARTZ

KANKRO-RULAĴOJ

Ne ĉiuj miaj amikoj estas teretaĝaj banaluloj. Kelkaj el ili atingis certan kulturgradon kaj ankoraŭ aliaj eĉ distingiĝis en la altaj sferoj de l' scienco. Inter la lastaj mia preferato estas Paul Hennemotte, ne nur ĉar li estas vere tre simpatia homo, sed ankaŭ lia scienco povas esprimiĝi sen la helpo de hermetika ĵargono. Ĝi parolas la klaran lingvon de l' ĉiutaguloj kaj komunikas senchavajn rimarkojn pri agrablaj konkretaĵoj. Paul Hennemotte, nome, estas gastronomo.

Kiam li aŭdis, ke mi intencas veturi al la sudfranca marbordo, li ĝentile dekretis: "Vi ne faros tiun eraron enĝavoniĝi iun vesperon en Parizo por vekiĝi la sekvantan matenon jam en Marseille! Neniu saĝulo konsentos pasi tra nia benata Burgonjo ne haltante tie almenaŭ la daŭron de du aŭ tri ĉetabligoj. Vi uzos vian aŭtomobilon, kaj se ĝi estas nur astme anhelanta kesto, des pli bone! Lasu al ĝi, kiel eble plej ofte, okazojn por ripozadi en la lando de l' afablaj kaseroloj. Tion vi ne bedaŭros. Ne pre dediĉu unu etapo-

paŭzon al Dorignoles, ĉe la hotel-restoracio de l' Plena Trogo. Por vespermanĝi vi komencos per ilia leporpasteĉo, stufita en Chablis-vino. Vi kezitos inter la porkpiedo sub truftavolo kaj la ŝafidaj renpecetoj flamumitaj laŭ maniero de l' mastrino. Poste mi konsilus iun neŭtralan pladon, por paciencigi la stomakon. Eble bovaĵon kradrostitan super vitligna fajro. Kaj tiam gustumu kun maksimuma plezuro la farĉitajn fungojn! Oni prezentos ilin ne dronantajn en grasajo, kio estas ĉiam humiliga por kreskaĵoj rikoltitaj la saman posttagmezon, nek perfortitajn per troa dozo da ajlo, kio estas murdo senekskuza, sed ankoraŭ firmajn, vivantajn, elŝvitantajn apenaŭ larmeton da oleo, kio metos sub vian palaton la instigan sensacion de ŝim-gusta arbargrundo. Aprecu tiun regalon kaj reprenu vian glason nur kun la fromaĝoj. Ankaŭ ili estas super ĉiuj laŭdoj, kondiĉe, ke vi elektos la ĝustan vinon. Ili havas ankoraŭ Mercurey 1929, la grandioza jaro!"

Kiaj ravantoj, tiuj gastro-
nomoj! Ili scias pentri la

tabloplezurojn per tiaj koloroj, helpe de elvokivaj ŝmacetoj kaj kisante siajn fingropintojn tiel avide, ke jam antaŭĝue via lango leketas la lipojn! Kompreneble do, ke mi sekvis la konsilon de Paul Hennemotte. Kaj tiel okazis, ke unu malfruan posttagmezon fine de Julio, dekdu kilometrojn post Carengy mi forlasis la ĉefŝoseon por uzi flankvojeton kondukantan al tiu fama Dorignoles, kien, cetero, mi neniam alvenis.

Mi komprenas nenion en la aŭtomobila mekaniko. Sed tute obstrukcita tiudirekte mi tamen ne estas. Kiam odoraĉas je brulanta ledo aŭ kaŭĉuko, je lado memkonsumiĝanta, kiam krome leviĝas el la motorregiono suspektinda fumkolono, ankaŭ mi kapablas konkludi, ke io funkcias ne normale. Tiam ankaŭ mi scias, ke plej saĝe estas senmoviĝi ĉe la voj-rando kaj atendadi helpon de la plej proksima preterpasanta aŭtomobilisto, ĝenerale pli kompetenta ol mi Kaj tiel estis. Ankaŭ li venis el la direkto de Carengy. Tuj li haltis kaj informiĝis kun hela rideto:

"Malfacilaĵoj?" kaj baldaŭ li konstatis: "Ne mirige!

Via akvujo estas tute seka kaj... truita. Jen la definitiva paneo. Sed vi estas bonŝanca."

"Bonŝanca?" mi ekdubis.

"Sinjoro", li klarigis, "vi ne povis trovi lokon pli oportunan por panei. Restas apenaŭ kelkcent metroj ĝis Baduroc, la proksima vilaĝo. Kaj en Baduroc ili preparas la plej famajn kankro-rulaĵojn el la tuta regiono. Ĉe Pierre-Ange. Vi mem gratulos vin pro via paneo."

"Sed mi havas nenion por fari en Baduroc. Mi volas ĉetabliĝi en Dorignoles."

"Ne hodiaŭ, sinjoro, ne hodiaŭ! Unue la garaĝisto devos ripari vian akvujojn. La vojaĝon vi daŭrigos morgaŭ. Vidu, mi havas en mia ilarkesto fortikan ĉenon kaj trenos vin ĝis Baduroc. Mi ja mem iras tien pro la kankro-rulaĵoj de Pierre-Ange kaj se vi ne kontraŭstaras, ni manĝos kune."

Tiel mi konatiĝis kun Philibert Frondace, veterinaro en Carengy, kiu konis ĉiujn bonajn gastejojn ĉirkaŭ Dijon kaj Mâcon, kaj kiu, ĝuste hodiaŭ, deziris manĝi kankro-rulaĵojn ĉe Pierre-Ange. La sinteno de sinjoro Frondace

inspiris fidon je l' unua vido. Tipa specimeno de Burgonja bonvivanto. Lia lumanta fizionomio, en kies mezo eksterordinare vigla nazo ŝajne ĝuis propran aŭtonomion, invitis al senretena amikiĝo. Krome, ĉu restis al mi alia eliro el mia stulta paneo? Adiaŭ do, farĉitaj fungoj! Bonvenon do, kankro-rulaĵoj!

Sed kio estas tiuj kankro-rulaĵoj? Mia simpatia savanto klarigis kun palpebla plezuro: "Certe, vi jam manĝis ezok-rulaĵojn. Eĉ en Parizo oni konas ilin. Inter ni, vi trovos la plej bonajn en Lyon, ĉe Panjo Filioux, sed ankaŭ ĉe Point, en Vienne, ili estas pli ol perfektaj. Nu, anstataŭ aldoni al via pasto pistitan ezokon, vi enmetas la vostkarnon, fajne hakitan, de kankroj, kuiritaj antaŭe, kiel kutime, en tre spicita buljono. Bone miksu tion ĝis vi havos tute homogenan pastajon kaj knedu el ĝi rulaĵojn", — sinjoro Frondace mimis la geston frotante unu manplaton kontraŭ la alia — "kiujn vi lasos kelkajn minutojn en akvo preskaŭ-bolanta. Surtabligu kun botelo da Pouilly-Fuissé kaj ĉiuj anĝeloj de l' paradizo envios vin. Tio estas la fundamenta principo de l' preparado, sed ĉiu kui-

restro havas sian propran recepton. Tiurilate Pierre-Ange superas ĉiujn siajn kolegojn je cent ulnoj. Kaj nun ni ne perdu pluan tempon."

Dank' al la ĉeno de sinjoro Frondace ambaŭ veturiloj alvenis facile en Baduroc, kie ni lasis la mian antaŭ la garaĝo-riparejo de Auguste Donadieu "ĝis morgaŭ matene."

Verdire, Baduroc ne estas vilaĝo. Ĝi havas la aspekton kaj la amplekson de urbeto, kun longa ĉefstrato, kun pluraĵoj, eĉ kruciĝantaj vojoj kaj pitoreska placeto ĉirkaŭ fontanmonumento. Mi tuj komprenis, ke ĝi havas certan altirforton, eĉ se nur gastro-nomian, ĉar antaŭ la restoracio de Pierre-Ange estis viciĝintaj tiom da aŭtomobiloj, ke sinjoro Frondace ne povis loki la sian sur la fasadflanko. Ni trovis liberan terenon nur malantaŭ la domo, apud la kortopordeto de la hotelo. Sed tie estis iom deklive kaj dezirante malhelpi eventualan ekruliĝon de l' veturilo dum nia foresto, ni serĉadis ŝtonon por kojnsovi ĝin sub unu radon. Nu, trovu ŝtonon en la centro de Baduroc, kie la progreso vestis la stratojn per asfalto! Feliĉe, la pordeto, antaŭ kiu ni haltis, estis duonfermita, tiel ke mi

povis rimarki sur la korteto amason da sekiĝantaj lignopecoj. Vere estas, ke sur la pordo granda ŝildo avertis: "Eniro strikte malpermesita", sed oni scias, kiom valoras tiaj avertoj en Francujo. Kaj mi eniris. Lumstrio, pasanta tra fendeto de fenestrokovrilo, tuj altiris mian atenton. La blindigita fenestro, apenaŭ super la ternivelo, apartenis al la keletaĝo. Nevole mi proksimiĝis. Tie estis la kuirejo de Pierre-Ange, hele lumigita. Inter grandaj fornoj tuta seso da kuiristoj kaj helpantoj manipulis adekvatajn ilojn dum unu dika viro, giganto, kun surkape la plej alta kuiristĉapo, kiun mi iam vidis, agitiĝis senpaŭze sub mia fenestro. Lia supra korpoparto estis tute nuda kaj — pro la staturo de la giganta viro tiu konstato mirigis min — tute senhara. El granda ujo sur apuda tableto li ĉerpis rapide, per ambaŭ manoj, iun flavan paston, kiun li frotis, per ĉiu mano aparte, kontraŭ la nuda brusto tiele produktante ĉiufoje du rulaĵojn! Jen do kiel li foruzis ĉiujn brustoharojn! Pro la streĉa laboro, pro la temperaturo de l' kuirejo, ŝvitriveretoj kaskadis senhalte de lia frunto, de la tuta vizaĝo, de

la larĝa brusto mem, tiel abunde, ke la rulaĵoj seninterrompe formiĝantaj, renoviĝantaj, ne sufiĉis por ilin forsorbi. Estis interese konstati, kiel rapide kreskas la amaso da pretaj rulaĵoj. Ja ĉiufoje po du! Interese sed... ne apetitveke. Mi gestis al sinjoro Frondace, ke li venu rigardi. Ĉe tiu spektaklo li preskaŭ ŝtoniĝis. Dum longa tempo li restis muta. Fine lia sendependa nazo donis la unuan vivsignon. Tiam li spiregis kaj furiozis:

"Ha skorzonero! Kia kani-balo! Kia naŭzulo!" kaj li seke decidis: "Sinjoro, neniam plu mi manĝos ĉe Pierre-Ange. Venu."

Vundite en sia gastronomia fiero li deziris ripari la nevolan misaĵon: "Ekzistas ankoraŭ alia gastejo en Baduroc, kiu ankaŭ havas certan famon, kvankam ne la reputacion de Pierre-Ange, sed ĉi lastan mi volonte mezurus per bastonaĉo! La kadro estas neluksa, la prezoj pli modestaj, sed ni manĝos bone." Kaj li pilotis min tra malvastaj stratetoj al la "Orhufa Kaprino", kie, je la plej granda ĝojo de mia gvidanto, ni trovis sur la menuo kiel unuan specialaĵon... kankro-rulaĵojn! Mi devas konfesi, ke tiu deli-

kataĵo tuj konvinkis min, ke sinjoro Frondace ne troigis siajn laŭdojn. Dank' al ĝi li retrovis sian bonhumoron. Ĉio estis bonega, nete prezentita, manĝaĵoj kaj vinoj, kaj ŝatinda ankaŭ la tolerema afableco de mildokula servistino, tiel ke du horojn poste ni estis amikoj poreternaj, konfinitaj en siropa beateco. Antaŭ ol leviĝi de la tablo mia kunulo petis, ke oni venigu la kuirrestron — estis la mastro mem de la gastejo — kiun li malavare komplimentis pri lia arto :

"... Ĉiuj pladoj estis zorge flegitaj sed pli ol ĉion ni aprecis viajn kankro-rulaĵojn. Ili estas vere noblaj, unikaj, grandiozaj kaj eltenas la komparon kun la plej renomaj.

Gratulojn !"

"Dankon, sinjoro", modes-tis la mastro, "sed mi ne volas uzurpi fremdajn laŭrojn, Mi ne dubas, ke vi trovis la kankro-rulaĵojn bonegaj, ĉar ni ja ricevas ilin ĉiutage, freŝe faritajn rekte de Pierre-Ange. En tiu ĉi fako li estas nesu-perebla. Li konas iun sekre-tan preparmanieron, kiun an-koraŭ neniu povis imiti."

Refoje la vizaĝo de sinjoro Frondace rigidiĝis. Eĉ lia nazo subite ŝajnis senanima. Fine, turnante sin al mi, li konkludis rezignacie :

"Mi timas, mia kara, ke ni malkovris la sekreton !"

Kaj ni mendis ekstre du Marc de Bourgogne por for-gargari subitan postguston.

WILLIAM AULD

MIA FILINO TRIJARA

Betulo korte kisas nubojn,
aŭroras froste kristalbril',
kaj ŝiajn blondajn harojn vento
ŝaŭmigas. Mildo kaj trankvil'.

Kiel kariko apudlaga
ŝi klinas sin penseme : ran'
pulsante, pene, saltmeditas
sub la scivol' de ŝia man',
dum kveras ŝia kor' kuraĝe
sub diafano de l' skrupul'
kaj lante tra l' matenaj herboj
aldrivas flokoj de nebul'.

STEFO URBAN

MARIO KAJ LA PAPILIOJ

Areto da bluj papilioj dancis super glata ŝtono kuŝanta meze de l' fluo de herbeja fosajeto ĵus trapasanta la vojon. Mario haltis, kaŭriĝis kaj komencis observi la svarmon. La papilioj flirtas en aero, por momento iu au tiu alteriĝas, atente kunmetas laflugilojn, dum du, tri aliaj papilioj leviĝas en elegantaj kurboj. Mario tre singarde proksimiĝis: du papilioj eksidis vid-al-vide kaj alterne svingas la delikatajn antenojn kvazaŭ en signala interparolo. Nenia dubo, la papilioj interkompreniĝas, Mario sentas tion. Sed estas malfacile kompreni ilian lingvon, treege malfacile; Mario ne sukcesas..., eble alifoje, negrave. Foje li tamen trovas la ĝustan ŝlosilon al ilia lingvo. La knabo rektiĝas kaj atente ĉirkaŭiras la lokon por ne dispeli la bluetan vibrantan svarmon. Ankoraŭ unu rerigardon: la papilia danco daŭras plu...

La vilaĝa vojo kondukas al arbareto. Mario ridetas; ĉu post la arbaro troviĝas fabela lando kun ensorĉitaj kasteloj kaj drakoj?... li ne kredas tion kiel Joĉjo. Iom aminde stulteta estas tiu Joĉjo. Mario

havas jam pli maturajn imagojn kaj esplorinteresojn, li estas pli aĝa. Io alia estas la eta natura lageto, kiu sin kaŝas tie inter la salikarbusoj; ĝi havas siajn apartajn misterojn. Sur ĝia kvieta akvo majeste naĝas la flavaj florkronoj kaj larĝaj folioj de nufaroj, iliaj trunkoj tiriĝas kvazaŭ ankroŝnuroj en la profundo. Apude sur libera akvospegulo reflektas sin la helblua ĉiela maro kun blankaj nubetoj. En la momento, kvazaŭ celita sago, preterzumas libelo, subite haltas en la senmova aero, turniĝas kaj eksidas en admirinda ekvilibro sur folioj. Mario sidas sur la bordo kun rigardo fiksita al la flavaj floroj, cerbumas. Eble ne estas tiom stulte kredi, ke ekzistas iu fabela lando...; nur, ĝi ne povas esti tute simple post la proksima arbareto. Oni ankaŭ ne povas iel facile vidi la duan mondon..., samkiel oni ne povas facile aŭskulti kaj kompreni interparolon de la papilioj.

La maturaj homoj certe scias ion pri tiu nevidebla mondo, sed ili elturniĝas, ne volas paroli pri ĝi kun infanoj. Jes, ili ĉiam elglitas. Sed

Mario scias, ke ne nur ĉiuj bestetoj parolas per sia propra lingvo, li scias ankaŭ, ke ekzistas eĉ la nevidebla sed efektiva mondo kun vivaj estaĵoj. Tiuj estas eĉ pli saĝaj ol la plej aĝaj homoj. Tia estas la afero : la homoj ne ŝatas paroli pri la alia mondo, ĉar... nu, ĉar ili ne toleras ion pli perfektan ol si mem. Ankaŭ la instruisto prisilentas tiun ĉi homan honton.

Mario iras tre malrapide hejmen. Li pretas malkovri la sekreton sen la maturaj, tute sola. Nur se li havus la bonŝancon vidi almenaŭ unufoje tian nevideblan... hmmm, aŭ ion similan. Ĉi ne devas esti ĝuste anĝelo, sed tia nevidebla..., nu, versimile ĉiuj nevideblaj devus posedi flugilojn. Sed ankaŭ senflugilaj povas esti... ; negrave, almenaŭ unusolan volus por momento Mario vidi, nur por momento, kun aŭ sen flugiloj. Certe oni devas tre atente kaj singarde observi, ankoraŭ multe kaj multe pli gardeme ol ĉe la bluetaj papilioj.

.....

E-A-D-C : Mario havas novan ludilon. Ĉi estas pli ol nura ludilo, la nova violono. Kun ĝi en la manoj li ne sentas sin plu eta knabo, sed

matura homo, pli ; Mario aperigis la sorĉon de vera kreado. Liaj fingroj, kvankam neekzercitaj, tenis jam dekomence la instrumenton kun nekutima certeco. Tiel, ke ne nur la patro, fervora muzikamatoro, sed eĉ fremdaj vizitantoj surpriziĝis, inter ili la urba orgenisto. Kvazaŭ la violonludo estus por Mario io delonge kutima. G.D.A.E. : estu kiel ajn, la arĉo glitas sur la kordoj delikate kaj firme, la kordoj sonas pure, sen kriĉoj. La Do-kordo velure, A kun klara timbro, E sonorile. Mario provas apliki unu kaj du fingrojn de la sinistra mano ; atenteme li tiras la arĉon, la montr fingro alterne premas la kordon : a-h-a, d-e-d-e kaj ripete, ĉiam malpli rapide, Tiel montris la patro, la tuta atento koncentriĝas al puro de l' tonoj, nenia ludo estas pli interesa. a-h-c, a-h-c..., Mario kunpremas la du fingrojn, precizigas la duonduton, kaj ree lia arĉo glitas sur liberaj kordoj, a-a-e-e, a-d-a-d, por ekvilibrigi la arĉon. Longe li ludas, malrapidigas la tirojn...

La patro ĝojas. Mario, aliffoje ne tre obeema, sekvas dum la ekzercado ĉiun konsilon. Sed li ne faras tion pro la gepatra plezuro, Mario

havas sian sekreton pri kiu scias neniu. Lian manon gvidas inspiro, tiu kiun li kaptis ĉe la bluetaj papilioj... Precize tiel delikate movas la papilioj siajn briletantajn flugilojn, kaj Mario sentas, ke nur tiel, kun la sama delikato oni sukcesas penetri en la duan mondon, nevideblan por la ordinaraĵoj. La muziko kondukas lin al la sopirata celo. Ne estas facile atingi la subtilan certecon, kiu estas bezona, pro tio Mario tiel zorgeme atentis pri la arĉo. Ne tre gravas, ke li manipulas kun nur kelkaj tonoj, por la nekompleta skalo valoras samkiel la kromata pleno por majstrokomponisto. La ŝlosiloj al grandaj enigmoj estas cetere ege simplaj.

Mario ĉesis ludi kaj metas la violonon piete sur pianon apud ĝi la arĉon.

.....

Pasis unu jaro. Mario ne forlasis la violonludon kiel faras ofte knaboj, ŝanĝante la objekton de sia amo en subitaj kaprioloj, kvazaŭ la aprila vetero. Li atingis ĵus la gradon kiam la muzikista komencanto kapablas interpreti kolekton da popolmelodioj. Krom tio la patro, kaptita de bona ideo, komponis specialajn pecojn

por Mario, al kiuj la orgenisto, sinjoro Petrov, aranĝis spritan piano - akompanon. Beletaj komponaĵoj estis tiu dudeko da pecoj kun primitivaj sed pregnantaj temoj kaj aparta moderna harmonio. Estis speciala ĝuo vidi kaj aŭskulti la duon : la eta Mario staras tre serioze kun koncentrita mieno, dum la muzikisto sidas super la klavaro alternante la maskojn laŭ la situacio. De temp' al tempo kuntiradas Petrov la brovojn duonzorgeme, por tuj montri ruzetan angulrideton, kiam li lerte sukcesis per siaj ĵongloj ekvilibrigi ian ritman gliton de la nesperta violonisto. Lia temperamento kaj artisma perfekteco ŝiras la disvolvigan talenton en la fluon de la viva muziko.

Mario ŝatis la merkredajn horetojn de ekzercado, penis esti inda partnero al la orgenisto. Kaj la sincera amikeco de ambaŭ muzikistoj fine kaŭzis, ke Mario decidis konfidi al sinjoro Petrov sian plej intiman sekreton kaj deziron. La gepatroj estis tiun dimanĉon en la urbo, kaj la komplezema muzikisto prenis kun plezuro la taskon resti post la frua meso ĝis vespero kun Mario. Posttagmeze Mario proponis promenon al la prok-

sima lageto, kiun li tiom bone konas. Ree dancis la papilioj...

— Sinjoro Petrov, ĉu ekzistas anĝeloj ?

La orgenisto enpenŝiĝis :

— Unu estas certa ; jam de ĉiam dediĉas pentristoj grandan atenton al similaj aferoj. Mi vidis sennombrajn belegajn bildojn kun ĉielscenoj, precipe en Italio. La pentristoj havas siajn imagojn ; mi, sidante foje en malplena preĝejo ĉe mia orgeno, havas ofte senton pri io tre subtila, senkarna, sed admirinde viva. Tiam, Mario, mi tiras tiujn delikatajn registrojn de la orgeno, kiujn mi montris al vi, kaj preludas. Krom sur la bildoj mi ne povas aserti, ke mi vidis similan estaĵon ; kial vi demandas Mario ?

— Nu..., mi ŝatus vidi la nevideblan... ; ĉu vi kredas, ke eblas... ?

— Eblas multaj aferoj, Mario, sed ne por ĉiuj homoj. Oni diras, ke almenaŭ unufoje en la vivo ĉiu havas la okazon : foje en sonĝo, foje alimaniere, ĉiu homo povas penetri en la misteran mondon. Kaj estas lia vico, ĉu li akceptos. Mi tre ŝatas sonĝojn.

— Kaj krom en la sonĝojn ? Mario insistas.

— Eĉ tiel povas esti. Rigardu !

Kaj la orgenisto prenas etan poŝpeguleton kaj faras lumefektojn en la proksimaj ombroj.

— Ĉi estas simpla, ĉu... ?

Nur artisto kapablus elpensi la spritan klarigon. Mario tre bone konas la amindan ludon kun la spegulo, ĉiuj infanoj ravite ĝin aklamas. La " oraj porkidetoj " ili estas. La orgenisto ne plu daŭrigas la klarigon, Mario kontentiĝis pri la montro ; ĉu li ne havas talentan artisman animon... ?

.....

Antaŭ vespero revenis Petrov al la urbo kaj Mario restis sola. Li promenis tra la ĝardeno, restis por kelka tempo sur altano, vagis kaj observis tie aŭ aliloke. Fine li revenis en la domon, faris lumon kaj ekfoliumis bildlibron. Dum la foliumo trafis lin dormo. Ĉi devis daŭri sufiĉe longe, ĉar kiam li subite rekonciiĝis, estis jam la nokto kaj la disko de la luno, duone kovrita de nuboj, grimacis tra la fenestro. Mario leviĝis el la brakseĝo kaj paŝetis al kanapo, kie estis preparita la ĝusta dormokazo, multe pli oportuna. Sed ĵus kaptis lin alia ideo : Mario demetis la ŝuojn, eliris sur la

koridoron, kaj silente kiel li nur povis, li ŝovis sin en la mallumo. Ĉe la malantaŭa pordo li moviĝis jam nur po milimetroj, tute neaŭdeble li prenis la klinkon kaj same po milimetroj komencis malfermi...

Ĝi estis nura kamero uzata por flankenmeti malpli bezonajn aĵojn kaj havis anstataŭ fenestro mallarĝan giĉeton. En angulo staris antikva spegulo en orumita kadro. Ĉu hazardo...? Ĉuste okazis, ke la plenluno traglitis la muron aliflanke de la giĉeto. kiam Mario atingis malfermon de kelkaj centimetroj en la pordo kaj pretis enŝovi la kapon. Plena fasko da radioj sin ĵetis tra la giĉeto rekte en la spegulon. Mario glitis flanken, ŝanceliĝis..., la pordo sin fermis; sed tiu apenaŭ sekundo tute sufiĉis. En unusola fulma rigardo estis ĉio.

Kiam la gepatroj revenis, dormis jam Mario. La patrino estingis la forgesitan lumon kaj retiris sin; ĉio en bon-

ordo. Sed Mario sonĝis: en la sonĝo la luma vidajo daŭris plu kaj plu. Sur la lumstrio, kiu komenciĝis ĉe la luno — grandega flava nufaro — trapasis la giĉeton kaj daŭris en senfina spaco de la orumita spegulo, petoleme glitadis unu post la alia etaj anĝeletoj, ekvilibre vibrigis siajn bluetajn flugilojn ĝis nekredeble similajn al tiuj de la papilioj. Kaj la ridoj kaj ĝojkrioj de la friponeta svarmo sonis samkiel la arĝenta sonirilkara E-kordo de la violono. Kaj denove, pluaj kaj pluaj anĝelinfanoj glitis sur la lumstrio, precize tiel kiel la homaj knaboj, tiuj friponoj el la tria klaso, glitadas ĉiutage sur la lerneja balustrado...

Mario observas kaj komprenas la nevideblan mondon: ĝi havas siajn plezurojn, jes. Nu..., efektive ili treege similas al la niaj, nenia dubo. Mario feliĉe ridetas pro la fakto. Sed nek la gepatroj, nek iu alia scias la veran kaŭzon de la feliĉega rideto de la knabo.

GERALDO MATTOS

PREĜO DE LA KURACISTO

Ho Dio de la vivo kaj Dio de la morto,
rigardu la turmenton de mia profesii'
kaj turnu la orelon al la humila vorto
de homo suferanta ĉe homa agoni' !

Por fronti la batalon de lumo kaj de ombro
al ĉiuj lokoj mi iras, palaco kaj kaban',
sed kiel mi sukcesos, se ies tagonombro
finiĝos pro decido de via pova man' ?

Sur korpo frostiĝanta de ia paciento
de vivo kaj de morto fariĝas la batal' :
armilon en la mano, obstinaj en silento,
mi luktas por la vivo, vi luktas por fatal'...

El scio kaj praktiko dum jaroj akiritaj
mi uzas kaj manovras la manon sur tranĉil' :
mi tranĉas, mi kripligas per strekoj senhezitaj,
se nur mi povas porti la vivon al stabil'.

Se mia mano venkas la oston de la tombo
post harda kaj peniga milito por la viv',
mi vidas retirigi al sia katakombo
la morton funebrigan en spita ofensiv'.

Se tamen el la korpo la tuta vivo fuĝas
kaj lasas min klopodi sur la kadavro nur,
sovaĝa mortigisto rimorse mi min juĝas,
ĉar mian bisturion makulas sangospur'.

Mi petas heziteme la pagon por la servo :
la mono min turmentus, se homo mortis for ;
se ree fluis sango kaj reviviĝis nervo,
pri mono ĝenus vorto en tia ĝoja hor' !

Dum mia tuta vivo, milfoje post recepto,
la samajn rekompencojn mi havas por la task' :
al mia vango ĵetas la homoj sen escepto
rideton post sukceso, insulton post fiask'...

Ho Dio de la vivo kaj Dio de la morto,
rigardu la turmenton de mia profesi'
kaj volu min provizi per saĝo kaj per forto,
ke beno por aliaj fariĝu mia sci' !

LA SKELETO

En tiu klaso, kie mi preparas
por la estonto ardaniman junon,
skeleto alta, nuda, blanka staras
kaj en skatol' evitas polvopunon.

Ho ! dispolviĝi en nenion bonas,
post la tempestrapida vivokrozo !
Vin por la studo la lernant' bezonas
kaj vin senigas do je tombripozo.

Mi vin rigardas sciencistokule
de la blankkalka verto ĝis la plando
kaj timas vidi el la ostoj rule
elrampi vermon, grasan de la frando.

De la okulaj kavoj grandkrateraj,
la belon la retinoj jam ne fiksas
kaj la nazostaj truoj degeneraj
odoron de viol' kaj rozo miksas.

La dentoj inkrustitaj en makzelo
ostblanka premas unu la alian
kaj mordas en sovaĝo jam sen celo
kaj maĉas la nenion tragedian.

Ripkrada kaj senkarna brusto plata
ne sugestias pri levitaj mamoj
de junulino, per beleco flata
tentanta nin al entreprenaj amoj.

Mi tamen vidas ian sveltan ĉarmon
en la severfunebra ton' skeleta ;
mi eĉ imagas, ke ĝi portis karnon
de junulino vigla kaj koketa !

Mi vidas ŝin per mamoj arogantaj
en fremdaj koroj veki mil dezirojn
kaj igi, per la koksoj pendolantaj,
ĵaluzi inojn kaj eksalti virojn.

UTA O J

1

Jen sola floras
pirarb' en vintrospito,
kiel mi nokte
ruliĝas en la solo
de dupersona lito !

2

De citronarbo
grandpintaj fruktoj pendas
kolektivite,
sed viajn mamcitronojn
amtimaj vestoj bendas...

3

Bekfrapas vikle
birdido ovopilkon ;
pli frape pikas
la pintoj de la mamoj
vian korsajan silkon

ACHILLE GREGOR

AUTO-EKSKURSO

Oni ĉiam rakontas pri Hanzelka kaj Zikmund ! Sed ankaŭ mi vojaĝis per aŭtomobilo kaj mi travivis multon. Nature, ekzemple en Suda Ameriko kaj sur Samojedaj Insuloj mi vere ne estis, sed mi povas fiere proklami : en la vilaĝo Kropaĉova Vrutice mi estis kaj mi rememoras pri tio. Kiel oni diras : vidi la urbon Napoli kaj morti, do mi ankoraŭ ne estis vidinta la vilaĝon Kropaĉova Vrutice kaj mi povis morti iom da fojoj. Mi vojaĝis tien kun la pentristo Smolka en ĉijara Junio. Jam la starto estis eks-cita.

“ Atentu — bremsu kaj malfermu la gas-elpuŝon ! ” vokis mia patrino el la fenestro. Ŝi estas konvinkita, ke oni ĉiam devas bremsi la aŭton, por ke ĝi ne veturu tro rapide. Laŭdire la vetveturantoj ne bremsas kaj tial ili veturas tiom rapide. Sed laŭdire oni ankaŭ devas malfermi la elpuŝon dum la bremsado, aliokaze la kunpremataj gasoj trarompigas en la internon kaj sufokas la vojaĝantojn. Tial ŝi opiniis, ke la malfermitaj veturiloj estas pli sanaj.

Ĉar ŝi dum ĉiu veturado ĉiam nepre postulis malfermi la gas-elpuŝon, unufoje mia bofrato trankviligis ŝin per tio, ke li sur la ŝoseo turnis la ŝaltilon de la direkt-montriloj. Tio estis malfeliĉa ideo. La patrino memoris tion kaj decidis, ke ŝi mem inspektos la danĝeran gas-elpuŝon, ĉar la bofrato estas tiel malatentema. Do ĉiuj alveturis ĝis la vojkruciĝo antaŭ la Hlavka-ponto, kie staris policano. Ĉe la veturilo sursaltis dekstra direkt-montrilo, li do donis signalon dekstren per la semaforo. Sed la bofrato haltigis. Tiam la policano ofendiĝis kaj signalis la verdan por la rekta direkto. En la sama momento la bofrato ekveturis, sed samtempe ankaŭ la patrino malfermis la elpuŝon, aŭ ŝi almenaŭ opiniis fari tiel, ĉar sursaltis la maldekstra direkt-montrilo. La policano volis kontentigi kaj ŝanĝis la signalon en tiun direkton, sed la aŭto ne ĝiris kaj veturis rekten. La aŭto de la policano en tiu momento rapide malaperis. Li forsaltis de sia postenloko, haltigis la veturilon, monpunis la bofraton pro malprava

veturado, sendis lin en dimanĉan kurson kaj proponis kuracistan konsultadon, ĉar li estis konvinkita, ke la bofrato estis akromatopsiulo.

Kontraŭe la patrino asertis, ke la bofrato veturis prave, sed ke la policano spitis ĉion al li. Ekde tiu tempo ŝi ne favoras la trafikan policon kaj asertas, ke la semaforo ne parolas tiom kaj estas malpli multekosta.

Do kiam antaŭ la ekveturo vokis al ni la patrino: "Atentu — bremsu kaj malfermu la elpuŝon!" Smolka rigardis reen, svingis la manon kaj trankvilige ekkriis: "Estu sen zorgoj, sinjorino —" Li volis ankoraŭ ion aldiri, sed li ne diris, ĉar rigardinte reen, li enveturis sur la trotuaron, batrompis la foston kun trafik-averto, sufiĉe fortikan, renversis tri cindrujegojn kaj pro ekscito li premis la klaksonon, kiun li enkojnis kaj kiu senĉese sonegis. La cindrujegoj freneze saltis de sur la deklivo, dum el ili kirliĝis la cindro, kiu ŝvebis en la aero kaj en kelkaj momentoj formis en la strato netravedeblan vualon, kvazaŭ ĉe maristaj manovroj. En ties interno knaregis la klaksono, malĝojkriis la infanetoj, ekscite bojis

la hundoj kaj vokis la patrino: "Malfermu la elpuŝon, malfermu la elpuŝon!", ĉar ŝi timis, ke io okazos, kvazaŭ ankoraŭ io povus okazi.

Kiam la nuboj de la cindrojomete disiĝis, la strato aspektis sufiĉe alilanda. Ĝi ne similis la Holeček-straton, ĝi pli eble aspektis kiel Pompaei kaj Herculaneum. Du cindrujegoj intertempe haltis mal-supre, en stando meze inter la florbrasikoj kaj mirabeloj, kaj la tria veturis en la trenvagono de la tramo numero dekkvin en la direkto al la vojkruciĝo ĉe Anĝelo. Kaj la amiko Smolka kun la cindro en sia hararo sidis sur la trotuaro kaj plorsingultis, ĉar li estas tre sentema kaj ĉia ajn bagatelajo tuj perturbas lian ekvilibron.

Kiam mi diskurigis la homamason, kiu nur tre malfideme akceptis la aserton, ke oni ne filmas la religian dramon: "Neniigo de Nineve", ni ascendis kaj ekvojaĝis en la direkto al Kropaĉova Vrutice. Malantaŭ ni resonadis teruregaj eksplodbruoj, kvazaŭ eksplodus unuopaj partoj de municia tenejo. Mi laŭte opiniis, ke verŝajne la strato estas subminita, sed Smolka klarigis al mi, ke tio devenas

el la gas-elpuŝo — ĉar, kiel li diris — la motoro estas ankoraŭ malvarmiĝanta, kvankam la termometro montris tridek gradojn en la ombro. En pafilegaj salvoj, ĉe kiuj la homoj elkliniĝis el la fenestroj kaj elkuris sur la trotuaroj, kredante firme, ke ni moviĝas per fuzaja motoro, ni forlasis la ĉefurbon Praha. Mi iomete regajiĝis, ĉar estas trajto de mia karaktero resti plej eble diskreta, kaj mi interesiĝis pri la trafik-avertoj, kiujn ni estis preterveturantaj.

La respondoj, kiujn mi ricevis el ili, vekis etan surprizon en mi. Mi ne supozis ĝis nun, ke oni tiom zorgas pri la ŝoforoj. Nur pli poste oni min instruis, ke tio, kion Smolka klarigis kiel amikan averton pri proksimeco de rapida refreŝigo, signifas nur "mallarĝiĝon de la veturvojo". Ankaŭ la kurblinio en la triangulo, kiun li klarigis per tio, ke en la loko estas multaj serpentoj, signifas ĝuste nur la vojkurbiĝon. Kaj ankaŭ la rado kun nigra strio transe ne signifas: "Atentu la funebran procesion!", kiel li asertis, sed la finon por limigo de la rapideco.

Ĝuste, kiam li estis klari-

ganta al mi, ke homfiguro meze de nigraj punktoj estas averto, ke en la arbaro troviĝas mirteloj, forŝiris sin nia tegmento kaj leviĝis malantaŭe tiel, ke oni povis pensi, ke ni moviĝas sur la ŝoseo pere de inteligente konstruita velveturado.

Sed Smolka ne tro atentis tion. Li veturis kontraŭ la deklivo kaj klopodis solvi la problemon, kiel envicigi la duan rapidon. Li plej ofte eraris envicigante anstataŭ tiu ĉi la rapidon reveturan, ĉar ambaŭ oni envicigis laŭ la sama maniero. Tute sen klopodo li sukcesis envicigi la reveturan rapidon en la momento, kiam ni situis en la mezo de la deklivo. La motoro ekbruegis kaj ni freneze ne nur veturis malsupren, sed suprenveturis ankoraŭ en la mezon de la antaŭa deklivo. Tie Smolka sprite ekbremsis.

Ni forlasis la veturilon, kiu tremis kvazaŭ rathundo kaj kies ĉiu lada parto estis tiel varmega, ke oni povus sen malfacilo friti platkukojn sur ĝi. Smolka deklaris, ke la magneto de la motoro provizore ne funkcias, tial li verŝajne ne surveturos la deklivon. Mi kompleze kredis lin. Mi kredus lin, eĉ se li kons-

tatus, ke ne funkcias pli multo krom la magneto.

Poste li ordonis al mi, ke ni ŝarĝu la veturilon per iom da brulŝtipoj el la kuba metro da ligno apud la arbaro. La veturilaĉo tiel ŝarĝita gajnas la rapidecon el sur la deklivo kaj surveturas la kontraŭan deklivon per la impeto de la ekveturo. Mi opiniis, ke tio estas la teoremo de Pythagoras, kaj tial mi portis la brulŝtipojn kun li. Poste ni enveturiĝis kaj Smolka malstreĉis la bremson. Kio okazis, tion oni povas kompari nur kun la momento, kiam mi foje enpaŝis sur tria etaĝo lifton, kiu tie ne estis.

Ni ekruliĝis el la arbaro per la rapideco de forŝirita vinĉo. Kiel unu el militveturiloj de Zizka, ni rulfalis antaŭen, sed tie ne estis krucaj militistoj, nur valetoj.

Tuj nia tegmento perdiĝis kaj malaperis en la malproksimo kiel timigita vesperto. Mi perdis spiron, mian papilkravatton kaj tufon da haroj sur iu ne tre alta branĉo de sovaĝa sorpo. Poste Smolka ekkriaĉis kaj mi elpuŝis la brulŝtipojn. La brulŝtipoj forfalis kaj la veturilo ekveturis tiel rapide, ke sango elfluis el mia nazo. Ankaŭ Smolka estis

bluiĝinta kaj liaj piedoj frostis.

Pro verŝajna perdo de juĝkapablo ni daŭrigis la veturilon. Ni traveturis ian senhoman vilaĝon, el kio mi konkludis, ke iu telegrafe avizas pri la direkto de nia veturo. Poste ni traflugis aleon de tilioj, kie la branĉoj de arboj vangofrapis nin. Kaj poste la veturilo haltis kaj Smolka konstatis, ke la alkonduko de la benzino estas plenŝtopita.

Pri tio, kio poste okazis, mi skribas nur kun certa malplezuro. Mi ne emas konduti tiel montriĝeme, sed Smolka devigis min, ke mi suprenrampu sur la malvarmigilon, rajde eksidu — dorson kontraŭ la veturdirekto — kaj blovu en la benzinujon. Tiel ni aperis en Kropaĉova Vrutice. Multaj piedirantoj kuris trote apud la veturilo kaj postulis senpagajn enirbiletojn, ĉar ili konjektis, ke alveturas cirkartistoj.

En la vilaĝon Kropaĉova Vrutice ni alveturis ĉe kora intereso de la tuta publiko, ĉar Smolka, kiu ne vidis trans min, breĉis arbitraĵan barilon kaj enveturis en la vilaĝan parkon. Antaŭ ol li orientiĝis, li jam veturis sur la trikolorretoj ĉirkaŭ la monumento.

Tiel ni finis nian aŭto-ekskursion.

Hodiaŭ mi estas preskaŭ sana. La kuracisto, kiu flegas min, asertas, ke mi suferas je

io, kio nomiĝas aŭto-fobio. Sed mi opinias, ke temas pri aŭto Fiat.

El la ĉefha trad.

J. Chvosta.

RIMARKOJ :

Hanzelka kaj Zikmund — du ĉefaj inĝenieroj, kiuj per aŭtomobilo traveturis Afrikon kaj Amerikon.

Zizka (legu : ĵiŝka) : armeestro de la ĉefaj popolarmeoj (15-a jc.), kiu helpe de batalveturiloj sukcese batalis kontraŭ la krucmilitistoj. Oni rakontas, ke Zizka foje rompis la liniojn de la malamikaj rajdistoj, sendinte kontraŭ ilin de sur la deklivo veturilojn ŝarĝitajn per ŝtonoj.

K. PIĈ

MEDITO

Neniam... !

Kaj tamen mi volus
iam...

Ho
Genjo !

VIRINOJ

Virinoj
virojn delogas ;

kaj kaŝas ilin
sub litoj,
sub tabloj,
en ŝrankoj ;

kaj fidelecon mensogas
per malfidelaj vortoj
kaj langoj.

LECONTE DE LISLE

LA VERANDO

*Al la lirlado akva de l' fontanoj porfiraj
Iranaj rozoj miksas la flustron molsusuran
kaj revaj turtoj sonojn de kveroj amsopiraj,
dum la jaluzaj vespoj kaj la kolibroj brilaj
kun zum' kaj fajfo figon mordetas tromaturan,
Iranaj rozoj miksas la flustron molsusuran
al la lirlado akva de l' fontanoj porfiraj.*

*Sur la verand' fermita, sub la arĝent-ombrelo,
en la aero varma, dolĉe jasmen-odora,
kien rozbrilan sagon sendas la taga helo,
jen, la persino reĝa kuŝas en muta belo,
plektante siajn manojn sub kolo brunolora
en la aero varma, dolĉe jasmen-odora,
sur la verand' fermita, sub la arĝent-ombrelo.*

*Ĝis ŝiaj lipoj, kiujn al ambra glob' ŝi premas,
ekde l' kristal', el kiu eskapas fumo fajna
kaj en facilaj rondoj al alto ŝvebe tremas,
sur silkkusen' skarлата, kiun orfloroj semas,
sin tordas nargileo fleksiĝa, serpent-ŝajna
ekde l' kristal', el kiu eskapas fumo fajna,
ĝis ŝiaj lipoj, kiujn al ambra glob' ŝi premas.*

*Par' da radioj sombraj kaj pezaj de ebrio
elŝvebas de l' okuloj duone sin fermintaj.
Envolvas ŝin la sonĝo, karesas ventostrio,
kaj, ĉar en nevenkebla torpor' de atonio
ekondas ŝiaj mamoj, la belaj, ŝvele pintaj,
elŝvebas de l' okuloj duone sin fermintaj
par' da radioj sombraj kaj pezaj de ebrio*

*Ekdormis akvo viva de l' fontanoj porfiraj,
de la Iranaj rozoj ĉesis flustrad' susura,
la revaj turtoj finis pri l' kveroj amsopiraj,
silento : la jaluzaj vespoj kaj birdoj brilaj
plu ne kverelas ĉirkaŭ la figo tromatura.
De la Iranaj rozoj ĉesis flustrad' susura,
ekdormis akvo viva de l' fontanoj porfiraj.*

El la franca trad. Tarkony.

REMY DE GOURMONT

PRIPENSOJ

La posteularo, tio estas lernanto, kiu estas kondamnita parkeri cent versojn. Li ekmemoras dek, balbutas kelkajn silabojn el la cetero : la dek, ĝi estas la gloro ; la cetero, ĝi estas la literaturhistorio.

* * *

La politiko dependas de la politikistoj, proksimume kiel la vetero dependas de la astronomoj.

* * *

La virinoj pelas la hipokritecon sufiĉe malproksime, por ke ĉiuj infanoj povu diri pri sia patrino, kun vera konvinko : " Ŝi estis sankta virino ".

* * *

Kio estas terura, kiam oni serĉas la veron, tio estas, ke oni ĝin trovas.

* * *

Kurioze : en literaturo, kiam la formo ne estas nova, ankaŭ ne la temo.

* * *

Hazardo donacis al la homo la inteligento ; tion li uzis : li kreis la stultecon.

* * *

Pia virino diris pri la amplezuroj : " Ili estas la dorlotajoj de la Providenco. "

* * *

— Vi sentas dubojn ? Pri kio, pri kiu ? Pri Dio ? Sed, tre simple : skribu al li. — Lian adreson mi ne havas. — Jen, efektive, la stato de la demando.

* * *

Virino iafoje kompatas la ĉagrenojn, kiujn ŝi kaŭzas sen memriproĉo.

* * *

" Unu vera sportisto, kaj krome inteligenta... "

El la franca trad. G. Waringhien.

LIBROJ AKIREBLAJ PERE DE « LA NICA LITERATURA REVUO »

Sendkostoj 10 %. Pageblaj : R. Fiquet Poŝta Konto 2259-98, Marseille

El la maniko , originala novelaro de Reto Rossetti,	fr.	785
Kontralte , originala poemaro de Marjorie Boulton,	fr.	785
Eseoj , Unua volumo : Beletro, de G. Waringhien,	fr.	785
La Floroj de l'Malbono , Poemoj de Ch. Baudelaire, trad. K. Kalocsay, G. Waringhien. 22 x 16 - 400 p.	fr.	1.050
Jozefo , de J.D. Applebaum laŭ biblia rakonto	fr.	420
La Vivo de la plantoj , de Prof. P. Neergaard	fr.	840
Sonĝe sub pomarbo - Triakta lirika komedio de J. Baghy 16 x 22 - 232 p.	fr.	750
Esperanta antologio , poemoj 1887-1957, kompilis W. Auld 22x16 - 648 p. broŝ. f. f. 1.500.— tolbind	fr.	1.750
Quo Vadis , de Sienkiewicz - Trad. L. Zamenhof, 21x15, 720 p.	fr.	1.050
Homoj kaj Riveroj , 140 p. novelaro de J.H. Rosbach bind	fr.	720
Virino ĉe la landlimo , originala dramaro de Marjorie Boulton, 13 x 21 — 196 p.	fr.	1.650
La Nigra Spartako , originala rakonto de Géraldo Mattos.	fr.	140
Dialekto, Dialektiko , Delfi Dalmay, 0,17 x 0,12, 88 p. . .	fr.	310
Plena Vortaro de Esperanto , kun suplemento de Prof. Waringhien, 13,5 x 10 - 572 p.	fr.	1.250
Leteroj de L.L. Zamenhof , kompilitaj de Prof. Waringhien, 2 vol. 20 x 14 - po 286 p. po vol.	fr.	950
Tri verkoj de Volter (Voltaire) trad. de E. Lanti.	fr.	960
Faŭsto I , Goethe, trad. N. Bartelmes, lukse bindita . . .	fr.	750
Mistero Minora de F. Szilagy, originala romano . . .	fr.	720
Retoriko , de Iv. Lapenna 2a eldono 296 p. broŝ. fr. 1.050.— bind.	fr.	1.280

REVUOJ ABONEBLAJ PERE DE « LA NICA LITERATURA REVUO »

Norda-Prismo , Stokholmo, Svedujo	jare fr.	1.000
Nuntempa Bulgario . Sofio, Bulgarujo	jare fr.	630
Suda Stelo , Ljubljana, Jugoslavujo	jare fr.	750
La Progreso , Beograd, Jugoslavujo	jare fr.	350

GLOSOJ

Ni konsideru nur la vortojn, kiuj mankas en la kvara eldono de la Plena vortaro de S.A.T.

akromatopsio : malsana nekapablo distingi la kolorojn.
apreci : kompetente ŝati la valoron de io.
degni : bonvoli.
distiko : duversaĵo.
duonduto : alternativa nomo por duontono.

hiko : malfacila punkto (el la latina : **hic jacet lepus** tie ĉi kuŝas la leporo).
kriĉi : akcipitre krii.
lirli : brueti, kiel kuranta rivereto.
nargileo : akvopipo.
pregnanta : signifoplena, temriĉa.
sinistra : maldekstra.

la nica literatura revuo

Abonprezo : fr. 400 — U.S. dol. 1,25 — aŭ egalvaloro.

Ricevas la abonojn :

en Francujo : R. Fiquet. Poŝta konto 2259-98 Marseille.

en Brazilo : Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. Caixa postal 3881, Rio de Janeiro.

en Bulgarujo : S-ro Stojan Ĝuĝev, 13 str. Parĉeviĉ, Sofio.

en Ĉeĥoslovakujo : S-ro Jaroslav Ŝustr, Dlouha 10, Praha.

en Danujo : Komuna Konversacia Klubo, Randbolvej, 4. Kopenhago F.
abonpago 8 d. kr. ĝirkonto 96.289.

en Hungarujo : S-ro D-ro Balint Szemenyei, Huba-u, 38, Oroshaza.

en Japanujo : Prometeo Nakatu-hamadôri 2-20, Ooyodo-ku, Osaka.

en Jugoslavujo : S-ro Josip Vajdlj, Podolje 15, Zagreb VI.

en Kanariaj Insuloj : S-ro J. Régulo Pérez, Apartado 25, la Laguna, Tenerife.

en Pollando : Związek Esperantystow w Polsce, Koźia 3, Warszawa.

en Rumanujo : S-ro Julio Csapo, str. Kinizsi 66, Satu-Mare.

en Svedujo : Norda Prismo, Barnhusgatan 8, Stockholm.

en U.R.S.S. : S-ro J. Ĥoves, poŝtkesto 1.004, Esperanto, Moskvo.

kaj ĉiuj ĉefdelegitoj kaj landaj perantoj de U. E. A.

LINGVO KAJ VIVO

Esperantologiaj Eseoj

GASTON WARINGHIEN

16 x 22 — 450 paĝoj

Broŝurita fr. 1.700 — Bindita fr. 2.000.

Marjorie BOULTON

EROJ

Originala poemaro

16 x 22 — 368 paĝoj

fr. fk. 1.200

sendkosto 10 %

Ni peras por niaj abonantoj.

NORDA PRISMO

El Stokholmo

Redaktoro :

D-ro Ferenc Szilagyi

jare fr. fr. 1.000

Petu senpagan specimenon

Ni peras por abonoj.

Le gérant : R. Fiquet, Nice

IMPRIMERIE CIARABELLI
15, rue de l'Escarène - NICE

